

# ASISTILO

ISSN 0997-3710

n-ro 14

Vintro 1993/94 Hiver

Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) d'ASISTI :  
Association Int. d'Etude des enseignements spirituels et théologiques.

Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj


Membro de IARF (*International Association for Religious Freedom*)

Neŭtrala faka asocio kunlaboranta kun Tutmonda Ekumena Ligo kaj U.E.A.

La 16-an de marto 1244  
pli ol 200 kataristoj  
estis brulmortigataj  
apud Montségur (F),  
nur pro sia kredo.

Ĉu la kristanaro,  
eĉ memeros ilin,  
post 750 jaroj,  
kaj pentofaros  
pro maltolero  
malkristana,  
neimagebla?  
Ili ripozu  
en paco !


La 17-an de aŭgusto 1993,  
ASISTI estis akceptata  
de the "International  
Association for Reli-  
gious Freedom", IARF.



(Expéditeur / Sendinto:)  
Asistilo / Ch. Lavarenne  
F-09800 Arrout (Francio)  
(Pck/CCP: 1042177R Mars)  
(CPPAP: n°71486)

L'unua  
ASISTI-a  
"Seminario  
Interreligia  
Esperantista",  
en Tabor (Ĉeĥio)

"Paŝo post paŝo"  
Ĉu ASISTI aliĝu al  
la "Monda Konferenco  
pri Religio kaj Paco"?





## Vorto de la redaktoro

Bonan novjaron al ĉiuj : la jaro de ligno-hundo komenciĝis la 10-an de februaro, por la Tibetanoj ; la bahaanoj baldaŭ festos Naw-Ruz, la 21-an de marto, ... kaj la tradicia novjaro restas celebrata ĉirkaŭ la 1-a de marto, per la karnavalo !

Tiu ĉi jaro estos tiu de la **unua Interreligia Seminario Esperantista, organizita de ASISTI** (vidu sur la lasta pago) : ankoraŭ ne estas tro malfrue por aliĝi ! Temo de la IRKE en Seulo: "Ĉu religiaj praktikoj povas transiri naciajn kulturojn?" Prelegontoj serĉataj (kont. Y.Umeda, IPOB 5458, Tokyo 100-31).

Kaj eble de nia aliĝo al WCRP...

Ĝi estos tiu de la 350-a datreveno de la naskiĝo de la kvakero William Penn, sed ankaŭ tiu de la 750-a datreveno de la martirigo de ĉ. 220 kataristoj rifuĝintaj en la kastelo Montségur (en Okcitanio).

Kaj eble ĝi estos tiu de la naskiĝo de nia presejeto, en Arrout, kie ni esperas presi la numeron 16 de Asistilo : tial nia malfruego !

Ni esperas ke vi bonvolos pardoni ĝin al ni, kaj ne same prokrastotos reboni vian revuon : ĝi vivas dank'al tro malmulte el vi...

Ligila Organo de la "Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj" (A.S.I.S.T.I.)

Trimonata (*laŭeble* !)

**Redakcio:** Blua Domo, F-08800 Arrout  
**ASISTI-Estraro:** prez. Yosimi Umeda, Christian Lavarenne: sekr.-kasisto, Leif Nordenstorm: Religia Antologio Bernhard Westerhoff: kunvenoj.

**Dir. de Publication :** Ch. Lavarenne

**Jarabono:** triono de 1 UEA-individa abono (MA) : 100FF/32gld/29DM/18\$ (duonpreze por malriĉaj landoj) al: - franca poŝtkonto "Asistilo", n-ro 10 421 77 R Marseille ;

- UEA-konto "asis-r" ;

- FEL-konto "elvr-n" ;

- norvega postgiro : "Ch. Lavarenne n-ro 0540-7849940" ;

- Marek Krainiski, ul. Albanska 28/2 PL-60134 Poznan (*laŭ interkonsento*)

**Subtena abono:** ekde 150FF/50gld/30\$

**Abonhelpa fonduso:** pliaj abonoj laŭ la tarifo valida por vi ; vi povas indiki adresojn al kiuj sendi ĝin.

**ASISTI-kotizo 1994:** deviga por esti membro, kia ajn ĝi estu (sed minimume kvarono de 1 UEA-MJ : 9,5gld, por okcident-Europo, norda Ameriko)

**Subtenanta membro :** ekde 70gld/40\$

Ne forgesu kontribui, dankon !

## Enhavo

Prelego ĉe UNESKO, de G. Gebhardt, vic-sekretario de WCRP .....	p. 3
ASISTI akceptita de IARF en Bangaloro (Bharato) .....	p. 4
WCRP-kolokvoj pri Eŭropo, en Cluny (F) .....	p. 5
ASISTI en Japanio (invitite de Oomoto), F.Degoul (F) .....	p. 6
Univ. Tao-Studligo Esperantista fondita de Radio Moro (PL) ...	p. 7
5-a Monda Konferenco de Fido kaj Konstitucio en Kompostelo (SP)	p. 8
Al forigo de la anatemoj, de la teologo W. Pannenberg (D) .....	p. 9
Biografio de Svamio Dajānanda / B. Griffiths (1906-1993) (GB)	p.10
300-jaraj Desiderata (Deziritaĵoj) trovitaj en Baltimore (USA)	p.12
Vi, la kosma harpisto (inspirita de Alan Watts), M. Sadler (H)	p.13
750-a datreveno de martiriĝego - Katarisma ritaro (sekvo) .....	p.14
50-a datreveno de la morto de Simone Weil (F) .....	p.17
300-jariĝo de la Amiŝoj, de Benedikto Vandeputte (NL) .....	p.18
Tibeto : la eventoj, kronologie .....	p.20
Letero de legantino : Lubica Rehušova (Slovakio) .....	p.22
4-a Kongreso de la edziĝintaj katolikaj pastroj en Madrid (SP)	p.23
800-a nakiĝdato de Sankta Klara (I) .....	p.24
Kalendaro de la (inter)religiaj renkontoj .....	p.25
Aboliciisto de la mortpuno : P-ro Albert Gau (1910-1993) .....	p.26
Mariavitoj, centjaraj, de Marek Krainiski (PL) .....	p.27
Al tutmondaj gefratoj, anonima poemo .....	p.27
Letero de leganto (Aŭstrio) .....	p.27
Nekredebla pretendo, recenzo de <i>La nekred. paradokso</i> de V.Brow	p.28
Nuntempaj spiritaj mesaĝoj (pagita anonco), de F. Degoul (F)	p.30
<i>Diccionari de mila mots occitans</i> ...en esperanto, de J. Taupiac	p.32
Interreligia Seminario Esperantista de ASISTI en Tabor (Ĉeĥio)	p.32



## Al "la dolĉa religio" ?

Konfliktoj estas parto de la homaj realaĵoj. Sekve, ne temas pri antaŭeviti konfliktojn sed esti atenta kaj malblinda pri potencialaj konfliktoj, antaŭeviti ilian perfortan eksplodon kaj reggvidi ilin laŭ malperfota maniero, kun la celo transformi la agresan potencialon kiu tie amasigas en fonton de kreemo, de konstruemo kaj de libereco.

Gvida principo de la malperforta reggvido de konfliktoj estas eviti ke estos venkinto kaj venkito - fonto de jam programitaj estontaj konfliktoj - kaj agadi al kulturo de l'kompromiso. Ĝi ne estas kulturo de reciproka forĵetado sed de la kreado de komuna estonteco kie ĉiuj gajnos. La jugoslavia tragedio montras ke konfliktoj kiuj delonge ekzistis inter la diversaj komunumoj ne povis esti solvataj subpremante ilin, do agante kvazaŭ tiuj konfliktoj ne ekzistus, kaj ke oni malatentis akcepti ilin kaj serĉi rimedojn reggvidi kaj transformi ilin.

Se la religioj volas fariĝi farantoj de tia malperforta kulturo de la kompromiso, ili devas unue alfronti la konfliktojn kiuj disvolviĝas ene de ili mem kaj lerni reggvidi ilin. Nu, la plej granda konflikto kiu nuntempe disvolviĝas tra la religia mondo ne estas konflikto inter religioj : la interreligiaj konfliktoj estas flankenpuŝitaj de la **intrareligia konflikto** inter la fundamentisma kaj liberala esprimoj de la sama religia tradicio.

Temas pri du religiaj kulturoj, kaj la granda interkultura kunfrontado okazas ĉe tiu ĉi kampo. Des pli ke tiu interkultura konflikto ne limigas sin je la interna vivo de la religioj - tiam ĝi vekus malmulte da intereso - sed ke ĝi havas rektan efikon sur la sociojn tiel ke la t.n. fundamentismaj tendencoj precize celas malstabiligi la sekularigitajn sociojn kaj altrudi al ili la totalismon de sia koncepto de socio

regata de religio, kiel bonege analizis tion la sociologo Gilles KEPEL.

La fundamentisma kaj liberala esprimoj de la religio reflektas kion la pacologo Johan GALTUNG nomas "la malmolaj flankoj kaj la dolĉaj flankoj" de la religio.

(...) Se la malperforta reggvidado de konfliktoj estas konsistaĵo de kulturo de la paco kaj se oni atendas signifan kontribuadon de la religioj, tio unue necesigas profundan transformadon de la religioj mem de ene, veran konvertiĝon al la dolĉa religio. La dolĉa religio estas ja ĉeestanta en ĉiu el la religioj, sed, tra la historio, ĝi ofte estis marginigata, malkredigata, subpremata, tial ke, laŭ ties difino mem, ĝi ne celas povon kaj regadon sed estas kritika rilate al povo. La dolĉa religio estas tiu kiu preferas subtenas la horizontan komunikadon, la dialogon inter kredantoj atingintaj la aĝon de religia matureco, la **komunan serĉadon de la vero kiu estas trans ĉiu religio** ; ĝi estas la religio de la akcepto de la aliulo, de la plureco kaj de la tutismo ("globalisme"). Ĝi estas la religio kiu daŭre ja donas al la individuo elementon de lia identeco, sed identeco kiu ĉiam inkluzivas la aliulon anstataŭ ol apartigi sin kaj sin izoli for de li. La ĉefa obstaklo pro kiu la religioj neniam vere faris tiun konvertiĝon al la dolĉa religio estas ilia timo perdi sian identecon malfermiĝante al pli larĝa koncepto pri la vero. Nu la religioj male trovas novan identecon, dezirata kaj partoprenota de multe pli granda nombro de niaj samtempuloj, se ili aŭdacus transformiĝi en fortojn de paco kaj de malfermiĝo.

**Günther Gebhardt\***

( El prelego , dum seminario ĉe UNESKO en 1993 en Barcelono. )

\* Asociita ĝenerala sekretario de WCRP (Monda Konferenco pri Religio kaj Paco).



**Someraj raportoj :**  
**ASISTI akceptita de IARF**

Dum la 28-a Monda Kongreso de la *International Association for Religious Freedom* (Internacia Asocio por Religia Libereco), kiu okazis de la 15-a ĝis la 18-a de aŭgusto en Bangaloro (Bharato), ASISTI estis akceptata de la IARF-konsilio la 17-an de aŭgusto, kiel la 49-a membro-grupo de IARF<sup>1</sup>.

La fina decido, flanke de ASISTI, estis voĉdonita dum ties jarkunveno en Valencio ĉar :

*"Ŝajnis al ĉiuj ke tia aliĝo ne estas kontraŭa kun la neŭtraleco de nia asocio ĉar la agado de IARF por subteni minacatajn aŭ subprematajn religiojn kongruas kun la punkto de la statuto pri aktiva neŭtraleco, ekzemple laŭ la modelo de Amnestio Internacia"*<sup>2</sup>.

#### La kongresoj

La sekretario de ASISTI partoprenis en la IARF-Kongreso kaj la tuj sekvanta "Sarva-Dharma-Sam-melana"<sup>3</sup> organizita de tri pliaj interreligiaj organizoj : *World Conference on Religion and Peace* (Monda Konferenco pri Religio kaj Paco, WCRP), *World Congress of Faiths* (Monda Kongreso de Religioj), kaj *The Temple of Understanding* (La Templo de Kompreno). Ĝi celebris la centjariĝon de la unua **Monda Parlamento de Religioj** kiu estis okazinta en Chicago (Usono).

Angla traduko de la "Preĝo sub la verda standardo" estis legata al la partoprenantoj (ĉ. 50) de la "Programo Unua" pri la estonteco de la interreligia movado, kun mallonga klarigo pri ĝia aŭtoro kaj esperanto.

Kaj dum la oficiala fermo (organizita de la gejunuloj !) antaŭ pluraj centoj da ĉeestantoj mallonga "preĝo" estis dirata, en ĉ. 15 lingvoj el kiuj la lasta

estis esperanto : *"Mi dankas pro la vivo kaj pro ĉiu el ni, kaj pro la spertoj kiujn ni komune travivis dum tiuj ĉi tagoj."*

#### Efika loka subteno

La sekretario estis tre afable kaj amike gastigata de nia samideano S.S. Pradhan, juna Ŝivaista brahmano, direktoro de la Bangalora Esperanto-Centro, kiu organizis tie la lastan tutbharatan kongreson en novembro 1992<sup>4</sup>, kaj verkis la unuan perkorespondan esperanto-kurson en la kannada (la oficiala lingvo de la bharata ŝtato Karnataka, kies ĉefurbo Bangaloro estas).

Por antaŭa okazo la centro ankaŭ estis presiginta 10.000 ekzemplere informan flugfolion en la angla pri esperanto, el kiuj pluraj dekoj povis estis disdonataj al kongresanoj.

#### Ankoraŭ limigita influo

Sed propono de rezolucio pri religia mallibereco en Tibeto, iniciatita kaj subtenata de ASISTI, ne povis lastmomente esti akceptata de la ĝenerala asembleo de IARF pro la fakto ke ĝi devintus esti proponata de oficiala delegito, kaj ke ĝia aŭtoro, bhutana lamao studanta en Bharato, kaj ankaŭ la sekretario de ASISTI, estis nuraj partoprenantoj en tiu ĉi kongreso.

Tiu bedaŭrinda formala rifuzo estis kompensata tri semajnojn poste, ĉar la sama teksto transformata en peticion estis subskribata de la granda plimulto el la partoprenantoj en internacia kolokvo organizita de la junulara sekcio de WCRP, kiu eĉ menciis ĝin en sia fina deklaro :

*"Ĉiuj homrajtoj sub internacia leĝo devas esti garantiata en iu ajn lando (inkluzive de Tibeto okupata de Ĉinio)"*<sup>5</sup>



## WCRP-kolokvo pri Eŭropo

Al tiu ĉi kolokvo kiu okazis en Cluny, Francio, de la 1-a ĝis la 8-a de septembro, la franca junulara sekcio de la Monda Konferenco pri Religio kaj Paco (angle: WCRP) invitis TEJO-n sendi reprezentanton <sup>6</sup>.

Entute estis 43 partoprenantoj, gejunuloj el la tuta Eŭropo, kaj la etoso fariĝis tre rapide bonega: amika kaj frateca. Estis tre densa programo kun du prelegoj ĉiutage, de elstaraj homoj kiel ekzemple S-ro Huko, membro de la grupo pri interreligia dialogo ĉe la Ekumena Konsilio de la Eklezioj <sup>7</sup>, universitatanoj, ktp.; laboro en 6 komisionoj: ekonomio, migradoj, homrajtoj kaj kultura plurismo, spiritualeco, ekologio.

La ASISTI-a reprezentanto elektis la komisionon pri spiritualeco, sed tamen ankaŭ akceptigis jenan homrajtan deklaracion: "La respekto por homa vivo devas konduki nin postuli de ĉiuj registaroj en la tuta mondo, ke ili finigu legalan mortpunon" (kaj subskribigis la peticion lanĉitan de la Partio Nova <sup>8</sup>).

Ĉar la komisiono pri spiritualeco zorgis pri la duonhoraj preĝoj/meditadoj okazantaj matene kaj vespere, iun matenon estis legata la "Preĝo sub la verda standardo", strofon post strofo, unue en esperanto kaj poste en ĝiaj (ASISTI-aj) tradukoj en la angla kaj la franca, post mallonga enkonduko pri la Hilelismo kaj Homaranismo de Zamenhof.

Kaj ankaŭ dum la lasta preĝo/meditado estis dirata en la lingvoj de ĉiuj partoprenantoj kaj fine en esperanto la "Universala Preĝo por la Paco":

"Konduku min de morto al vivo,  
de mensogo al vero.

Konduku min de malespero al  
espero, de timo al fido.

Konduku min de malamo al amo,  
de milito al paco.

Paco plenigu nian koron, nian  
mondon, nian universon.

Pacon! Pacon! Pacon!"

Kiel ĉiuj aliaj partoprenantoj la ASISTI-ano povis prezenti sian movadon en 10 minutoj. Esperanto estis do nur menciata kiel laborlingvo de ASISTI, sed post tiu mallonga prezentado same kiel post la matena preĝo, pluraj ĉeestantoj petis informojn pri esperanto kaj ricevis i.a. la TEJO-flugfolion (red. de Thomas Pusch), ĉiu en sia propra lingvo krom japano (ekzistas nur en la ĉina), rumano...; kaj ankaŭ la anglalingvan flugfolion verkitan de S.S. Pradhan (Bangalora Esperanto-Centro).

## Venonta agado

La sekretario de ASISTI estas komisiita de la junulara sekcio de WCRP por kunordigi la preparadon de ties venonta kolokvo, komence de septembro 1994, titolita: "Mare Nostrum, defio kaj bonŝanco de plivastigita kultura horizonto por Sud-Okcidenta Eŭropo: Kiel interreligia edukado en mediteranea Eŭropo povas plibonigi la integriĝon kaj redukti la migradojn".

Estas nun pripensata partoprenado de plenkreskulaj esperantistoj kiel invititoj por unu aŭ du el la prelegoj (probable pri Homaranismo), kaj gejunulaj kiel kolokvanoj. (Interesitoj bonvolu peti informojn de la redakcio <sup>9</sup>).

**Christian Lavarenne**

1/ La 69-a se oni inkluzivas la asociitajn membro-grupojn, kiuj ne havas voĉdonrajton.

2/ El raporto en *Valencia Suno* n-ro 6.

3/ Laŭvorte: "Ĉiuj-religioj-kunveno".

4/ Vidu *Esperanto*, dec. 1992, p.211.

5/ Vidu la tekston de la peticio sur p.22.

6/ Sabira Staahlberg, vicprezidantino de TEJO kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, petis Yves Bellefeuille (Ĝenerala Sekretario de TEJO) transsendi la inviton al ASISTI. Kaj S-ro Umeda, prez. de ASISTI, transdonis la leteron al Christian Lavarenne, la franca sekretario, petante ke li mem partoprenu en ĝi.

7/ WCC en la angla, COE en la franca.

8/ Eksa itala Partito Radikale. Ni reproduktis ĝin en *Asiŝtilo* n-ro 13, p.32.

9/ Blua Domo, F-09800 Arrout, Francio.



## ASISTI en Japanio

Lastmomente Christian Lavarenne proponis al mi anstataŭi lin en Japanio, kiel reprezentanton de ASISTI. Mi konsentis plenumi tiun mision, ankaŭ verki ĉi-raporton.

Invitite de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto, mi partoprenis unue la 80-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj en la urbo Kameoka, la 7-an kaj 8-an de aŭgusto 1993, kaj en la posta tago la jubilean programon de E.P.A. de Oomoto okaze de la 70-a datreveno de la menciita asocio.

Mi gvidis ASISTI-kunvenon dum la kongreso, kun 5 aŭ 6 homoj de vidpunktoj sufiĉe malproksimaj por okazigi veran interŝanĝon.

Mi prezentis dum Forumo pri Azio kaj Pacifika Regiono koncizan resumon pri situacio de esperanto en okcidento, havis apenaŭ 10 minutoj por komprenigi al toleremaj orientanoj, kial la okcidentanoj atingis tian gradon da religia maltoleremo ke ili reciproke kontraŭbatalis dum la mezepoko kaj nun daŭre malamas en Jugoslavio.



De tiu memorinda tago, la ĉi-kuna foto restas al mi la ununura memoraĵo... Ne, mi forgesis, ke post la mirinde luksa bankedo adiaŭa en Ajabe, niaj gastoj invitis nin preni unu floron el giganta bukedo, kaj por eviti damaĝojn de longaj horoj aviadilaj, mi elektis modestan floretan bluan, kiu nun sekigite postvivas inter du paĝoj de dika volumo.

Verdire, mi daŭre preferas nemateriajn memoraĵojn: la nedireble belan spektaklon aviadilan de la diserigita luma urbo Osaka kun vicoj da trankvilaj aŭtolumoj, la paradizan etoson de la vesperaj bankedoj, la unua en verda parko subkrepuska, la dua en salono larĝfenestra, la delikatan akceptemon de miaj gastigantoj, la ŝvitigan baraktadon kun manĝo-bastonetoj...

Ne kredu tamen, ke mi iris Japanien por turismi; mi fidele plenumis la mision.

Kvankam mi sentis, ke la ĉesstantaro malfacile komprenas nian tradician fierecon orgojlan pri la propra religio, hereditan de la juda popolo kaj de la greka ligo inter unu dio kaj unu civito, tamen kelkaj esprimis al mi grandan dankon.

Dum la ceremonio en Ajabe mi laŭtlegis la unuan duonon de la Preĝo sub la Verda Standardo kaj partoprenis en ofero de verda branĉeto...

Certe mi konstatis ke oomotanoj akiris bonan religian kulturon, kaj pro tio pli kapablas tolereme interŝanĝi spiritajn aŭ religiajn ideojn ol multaj aliaj...

Dum tiajn diskutojn ni ĝuis, S-ro Umeda informis nin ke komenĉas la kunveno: "S-ro Degoul, bonvolu enkonduki la debaton pri esperanto kaj paco". Tiu tasko certe bone konvenis por ASISTI-reprezanto... François Degoul



La fonda kunveno okazis la 27-an de julio 1993 en Valencio. La tuj elektota prezidanto cetere faris jenan prelegeton dum la IRKE :

Toleremo estas esenca parto de taoismo, ne aldonita sed kerna. Kompreneble kiel homoj taoistoj ne ĉiam sukcesis esti toleremaj. Mi scias ke iam en la ĉina historio...


Estas ankaŭ du asocioj kiuj ne invitas unu la alian al konferencoj. Tamen toleremo estas esenca.

"Wu wei" : ne-agado. En ermitejo angla sinjoro, Blofeld, demandis al la ermito : "Fakte, kion vi faras ĉi tie en la montaro?" La majstro ŝerce diris : "Estu certa, sinjoro, ĉi tie ni faras nenion". Kompreneble nura serĉo. "Wu wei" havas kelkajn signifojn : fari nenion, aŭ ion kiel oni ne faras, aŭ fari sed ne fari ion nenaturan, t.e. esti agresema. Oni ne devas havi agreseman spiriton. Deziro subpremi, submeti aliulojn al nia volo estas absolute ne-taoisma.

Ni povas interagi kun homoj, kaj nature ŝanĝi ilian opinion iom post iom, sed nenion altrudi. Lao-tzu skribis eĉ :

"Mi amas la bonajn homojn kaj la malbonajn homojn. Mi fidas la fidindajn homojn kaj la nefidindajn homojn..." Ĉu indiferentemo? Tute ne. En Tao Te Ching: "Pli bonaj homoj kaj malpli bonaj homoj. Sed la Ĉielo ĉiam estas je la flanko de la bonaj homoj". Taoismo estas tre praktika. Estas homoj kiuj deziras esti NE toleremaj. En tiu kazo taoisto ja havas la rajton uzi perforton, eĉ antaŭtaksi se tio povas malgrandigi la malbonon; sed nur kun sincera bedaŭro (...). Sed ni devas fari tion en tolerema maniero ... en paca maniero! "Gamboj de grupo

Tao,  
Zeno...  
kio  
estas\*?



Ĉnuang-tzu diras :  
"Fiŝoj vivas en akvo kaj ne konscias pri tio. Homoj vivas en la regno de la Tao kaj ne scias tion!"  
La homoj estas sorbigitaj de la maro de la Zeno sen koni la naturon de la Zeno."



estas nature longaj kaj oni ne povas mallongigi ilin aŭ fari cignon el grupo. Gamboj de anaso estas nature mallongaj kaj oni ne povas plilongigi ilin aŭ fari grupon el anaso..." Same pri la homoj. Eble ni opinias, ke homoj de malsamaj religioj eraras sed tio ne signifas, ke oni devas ŝanĝi ilin, altrudi ŝanĝojn. Ne esti konfliktema, al trudemaj parto de la mondo (...)

Bradío V. Moro III  
(Skrytka 147, PL-47220 Kedzierzyn-Kozle)  
\* Trad. el Ts.Ch.Chung, Zeno, la Libro :  
Libereco de la Spirito, Carthame éd., 1987



## 5a Monda Konferenco de "Fido kaj Konstitucio"

(La teologia komisiono de la Ekumena Konsilio de la Eklezioj)

350 delegitoj, reprezentantaj ĉiujn kristanajn ekleziojn, unuafoje inkluzive de la katolika, kunvenis en Santiago de Kompostelo (Hispanio) en aŭgusto 1993 pri la temo: "Al la kojnonia (komuneco) en fido, vivo kaj atesto". La *Croix* dediĉis almenaŭ dekkvinon da artikoloj al tiu renkonto, la unua post la II-a Koncilio Vatikana, kaj kiu okazis 30 jarojn post la 4-a Monda Konferenco en Montrealo (Kebekio). Ni tradukas nur kelkajn erojn el tiu abunda materialo.

"Ni havis dek konsultadojn preparaj al Kompostelo sur la diversaj kontinentoj. En ĉiuj kazoj la koncepto "kojnonia" estis tre ŝatata", diris Günther Gassmann, direktoro de la sekretariejo de "Fido kaj Konstitucio". Kojnonia signifas komunecon kiel "interdependecon de unueco kaj diverseco". Sed "la vojo irinda ĝis plena komuneco estas ankoraŭ longa. La horizonto de unueco ŝajnas eĉ same for je ĉiu nova paŝo antaŭena." (Bruno Chenu).

La konferenco, kies malfermo estis salutata per mesaĝo de la papo, estis prezidata de **Mary Tanner** (anglikanino), prezidanto de la Komisiono "Fido kaj Konstitucio". (Tiu ĉi estis naskita en 1927 en Lausanne (CH), dum la 1-a Monda Konferenco kiu deklaris:

"La Spirito de Dio estis meze de ni. Ĝi plivastigis niajn horizontojn, stimulis nian komprenon, vigligis nian esperon. Ni aŭdacis kaj Dio pravigis nian aŭdacon. Ni neniam plu estos tiaj kiaj ni antaŭe estis." )

Partoprenis ĝin **Konrad Raiser**, ĝenerala sekretario de la Ekumena Konsilio de la Eklezioj (Genevo)\* kaj la kardinalo **Eduardo CASSIDY**, prezidanto de la Pontifika Konsilio por la Unueco de la Kristanoj (Romo), kiu klare deklaris sian opinion favora al ekleziologio malsama ol tiu de lia kunfrato la kardinalo **RATZINGER\*\***.

M-ro **Cassidy** diris:

"Mi kredas, ke Jesuo-Kristo alvokas siajn disĉiplojn al unueco, kaj ke la aktuala movado al videbla unueco de la kristanoj estas granda donaco de la graco de Dio (...). Mi kredas ke ĉiu emo dividi la kristanojn, kaj ĉiu konsento daŭrigi la dividon, estas kontraŭ la volo de Dio (...). La muroj de apartigo komencis esti anstataŭigataj de la ligiloj de komuneco."

La divido, laŭ **Mikaelo Kubler**, cetere estas malpli inter katolikoj kaj protestantoj, ortodoksuloj aŭ metodistoj, ol inter malsamaj rigardoj al ekumenismo, kiel diras ankaŭ la franca dominikano **Johano-Maria Tillard**, vicprezidanto de "Fido kaj Konstitucio": "Oni vidis fundamentistojn sin interfronti kun defendantoj de enkulturiĝo ĉe la limo de sinkretismo. Ĉio ĉi faris novon en la ekumena dialogo." Sed li konkludas: "La ekumena spirito eliras plifortigita el tiu asembleo. Ni estas ĉiuj gefratoj, en la profundo."

M-ro **Desmond TUTU** krietis:

"Nia mondo disatomigas. La Eklezioj povas doni al ĝi profetan signon retrovante sian unuecon. Kial tiom da inerteco? Ili prenu do tiun riskon kaj lasu la teologojn poste elturniĝi (...)"

M-ro **Johano (Zizioulas)**, metropolitano de Pergamo rimarkigis: "Ni ne estas alvokataj al la kojnonia ĉar tio estas bona por ni kaj por la Eklezio, sed ĉar ni kredas je Dio kiu estas, en sia vera Esto, kojnonia." Oni ne estas kristano tute sola. La diferencoj inter kredantoj estas necesaj por ke vere estu Eklezio; kaj ĉiu loka Eklezio estas aŭtentike "katolika"\*\*\*.

Laŭ M-ro **Aram Keshishian**, armena primaso de Libano, prezidanto de la Centra komitato de la Ekumena Konsilio de la Eklezioj, la ĉefa demando de ekumenismo ne plu estas "Kia estas la naturo de la unueco kiun ni serĉas?", sed "Kia estas la naturo de la Eklezio?".



Kiam la kristanoj akordiĝos pri tiu punkto ilia unueco ne estos malproksima.

Laŭ Nikolao Lossky, el la Moskva patriarkujo, instruisto ce la Instituto Sankta-Sergo en Parizo, "Kompostelo klare difinis la postulon por ĉiuj vere konfesi la unikan kredon kaj samtempe rekoni la diversecon de ties esprimoj (...). Ni ĉiuj rekonis la neceson de universala "ministerio" (t.e. servo) de la unueco..." Kaj la prof. Andreo Birmele daŭrigas: "...kiu ne estu necese identa kun la ministerio de la episkopo de Romo tia kia ĝi estas nuntempe plenumata, sed kiu bone povus esti rekonota al li, kondiĉe ke tiu ministerio estu rekonsiderata de ĉiuj Eklezioj." Kaj N. Lossky aldonas:

"Jes ja: se oni havas kolecion de episkopoj, devas esti iu por prezidi ĝin. Sed tio ne implicas ke tiu ĉi dikturo al siaj egaluloj kion ili devas diri aŭ pensi!"

Unu konkludo de la debato: "Ni insiste petas ĉiujn Ekleziojn trovi la vojojn kiuj kondukos ilin reciproke rekoni ĉe la aliaj la apostolan kredon." Tio estas la "aŭtentika, origina kredo", kiun la Eklezioj ne ĉiam volis rekoni ĉe siaj najbaroj.

Unu konstato: "La katolikoj ne plu formas kontinenton izolita de la aliaj, sed trovis sian lokon en la koncerto de la konfesioj." (Michel Kubler).

Unu ero el la fina mesaĝo al la Eklezioj: "La kojnonia estis ĉe la centro de niaj debatoj (...). La kojnonia kiun ni spertis estas pli ol nura vorto (...), ĝi estas ne malpli ol la repaciga ĉeesto de la amo de Dio. Dio volas la unuecon por la Eklezio, por la homaro kaj por la kreitaro ĉar li [aŭ ĝi?] estas kojnonia de amo, la unueco de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito (...).

Nur Eklezio kiu mem estas resanigita povas proklami la resaniĝon al la mondo laŭ konvinka maniero."

Unu propono: "Kial ne koncilio de ĉiuj Eklezioj en 1998, okaze de la 50-jariĝo de la Ekumena Konsilio?" ■

## Intervjuo kun Wolfhart Pannenberg

- Ĉu la anatemoj de la XIV-a jc., inter katolikoj kaj protestantoj ankoraŭ validas?

Ekumena komisiono, en Germanio, konkludis, ke ili nun estas kadukaj. Sed ankoraŭ restas al la Eklezioj ratifiki tiun rezulton oficiale nuligante la anatemojn, kiel tio estis farita inter Romo kaj Konstantinopolo. Mi estas optimista. Nun de 450 jaroj ni estas apartigitaj: ni ankoraŭ havu iomete da pacienco!

- La nuligo de la anatemoj tamen, ankoraŭ ne signifas la unuecon: Kiel vi imagas tiun ĉi realiĝi?

Certe ne per dissolviĝo de la aliaj Eklezioj en la romkatolika! Oni devas trovi modelon de unueco, ebliganta ĉiujn Ekleziojn resti kio ili estas, fundamente, sed pli bone reliefigante kion ili havas komuna.

La reciprokaj ekskomunikoj inter Romo kaj Konstantinopolo estas forigitaj. Ĉu ne venis la momento por same agi rilate al granda nombro da anatemoj reciproke ekdiritaj inter la eklezioj de la 16-a jc.? Ilia forigo, liturgia celebrata fare de la ekleziaj aŭtoritatoj, montrus ke tiuj anatemoj de la pasinteco ne plu atingas la partnerojn de hodiaŭ. Ĝi permesus manifesti ke multaj punktoj ne plu prezentas problemon. Sekvante la modelojn kolektitaj en la antikva Eklezio, ili montrus, ke la diferenco de doktrinaj lingvaĵoj estas akordigebla kun la unuanimeco en la kredo (Grupo de Dombes, jam en 1987)

(Notoj de la apuda artikolo)

\* Vidu artikolon pri li, okaze de lia elekto, en Asistilo n-ro 11, p.6.

\*\* Tiu ĉi publikigis en 1992 malbone akceptitan dokumenton: "Iuj aspektoj de la Eklezio komprenita kiel komuneco".

\*\*\* T.e. "Eklezio en pleneco", precizigas Mikaelo Kubler en noto.





---

**Svamio Dajânanda :**  
**Pro Bede GRIFFITHS (1906-1993)**  
**Granda pioniro de la interreligia dialogo**

---

Ne multaj , verŝajne , estas tiuj kiuj konas la nomon de Pro Bede GRIFFITHS , kiu ĵus "pasis sur la alian bordon" en sia aŝramo de *Saĉĉidânanda*<sup>1</sup> ĉe *Ŝantivanam* (la Pacarbareto) borde de la Kaveri , la granda sankta riverego de Tamil Nadu (Sud-Bharato).

Tiel , tamen, unu el la lastaj pioniroj de la *Nupto de Oriento kaj Okcidento*<sup>2</sup> eniris en la Silenton de la Absoluto, kiun li ne ĉesis aŭskulti en la profundo de la *guhâ* , la kora "kaverno".


De kelkaj jaroj , respondante al multaj alvokoj en Eŭropo kaj Nord-Ameriko , li akceptis forlasadi dum kelkaj semajnoj la pacon de sia aŝramo por malkaŝi , al pli kaj pli misfartanta mondo pro ties regaditeco de la teknologio , la voĉon de aŭskultado kaj de silento.

### Biografio

Naskita en decembro 1906 en vilaĝeto de Anglio , li tre frue malfermiĝas al poezio same kiel al vastaj spacejoj (...). Dum preskaŭ kvin jaroj (1925-1930) , studento en Oksfordo li absorbi ĝas en poezio kaj poste en filozofio . Kun kelkaj amikoj li provas komunuman vivon en la kamparo.

Post ties malsukceso , en plena spirita krizo , pli ol iam ajn li absorbiĝas en legado . Tra la poetoj kaj la historiistoj same kiel tra la filozofoj li malkovras - preskaŭ samtempe - Biblion, Bhagavadgiton kaj Laŭzi (Lao-Ce).

Dum Kristnasko 1931 li estas akceptata en la katolika Eklezio kaj unu monaton poste, petas esti akceptita en la benediktana abatejo de Prinknash.



Post dujara monaĥo-kandidateco li estas akceptata kiel novico en decembro 1933 . La sekvajn jarojn liaj teologiaj studoj enkondukas lin en la "frekventon" de Sankta Tomaso la Akvinano . Sed , sub la influo de Christopher DAWSON, li ankaŭ komencas seriozan studadon pri la aziaj religioj, pri la ĉina kaj hinda pensoj, ĉefe pri vedanto . Studado kiun li daŭrigas post sia pastra ordinarigo la 9-an de marto 1940.



En 1955 oni proponas al li aliĝi al projekto de fondo de benediktana monaĥejo en Bharato, apud Bangaloro. Tiu projekto ne efektiviĝis, sed tiuokaze P-ro Bede renkontas belgan trapiston, P-ro Francis MAHIEU, kiu, la saman jaron, venis kuniĝi al P-ro Jules MONCHANIN, pastro el Liono kaj P-ro Henri LE SAUX, benediktano el Bretonio, en la ermitejo kiun ili fondis en 1950 sur la bordo de la riverego Kaveri, ne malproksime de Tiruĉirapalli (Trichinopoly).

Sed en 1956 P-ro Francis estas invitata de Siritradicia episkopo el Keralo, por redoni vivon al tiu respektinda liturgia kaj monaĥa tradicio. Konsentite kun P-roj Monchanin kaj Le Saux, li akceptas tiun proponon kaj petas P-ron Griffiths kuniĝi al li. Tiel en 1958 naskiĝis la monaĥa aŝramo Kuriŝumala en grandioza sed severa situo de Keralaj montoj, ĉ. 1100 metrojn alta.

Laŭlonge de la jaroj la benediktana tradicio, pli speciale en sia cisterciana formo kaj laŭ la antioĥa liturgia kaj patristika heredaĵo, alprenas hindajn monaĥajn kontribuadojn. Ĉefe post la Konkilio Vatikana la II-a kaj la eŭkaristia kongreso en Bombay en 1964.

En 1968 P-ro Le Saux, sole restanta ĉe Ŝantivanam post la morto de P-ro Monchanin (oktobro 1957), kaj pli kaj pli altirata de la himalajaj ermitejoj ĉe la fontoj de Gango, petas la fondintojn de Kuriŝumala redoni vivon al la aŝramo ĉe Ŝantivanam.

P-ro Francis - kiu kune kun la bharata civitaneco prenis la nomon Acarja - restas ĉe Kuriŝumala kaj P-ro Bede, kun du hindaj monaĥoj, alvenas al Ŝantivanam al kies aŝramo li donos novan impulson, stampitan de lia propra karaktero kaj de pli kaj pli profunda inserteco en la hinda kulturo

kun pli kaj pli grava dimensio de interreligia dialogo. Ŝantivanam tiel fariĝas ejo de renkontoj inter la kulturo kaj spiritaj tradicioj de Hindio kaj tiuj de Okcidento.

Cetere, zorganta certigi la kontinuecon same kiel la enradikiĝon en la okcidenta kristana monaĥismo, P-ro Bede estas kondukita ektili kun la benediktana kongregacio de Camaldoli (Italio), kiu kunigas komunuman kaj ermitan vivojn. La aŝramo de Ŝantivanam aliĝis al ĝi en 1980.

Post kvin jaroj okazas la unuaj monaĥaj ĵuraliĝoj de bharatanoj, sekvitaj en januaro 1986 de du pastraj ordinaroj. P-ro Bede kiu eniras sian 80-an vivjaron povas, kiel la maljunulo Simeono [vidu Lk 2, 25-32] prikanti la lumon kiu leviĝas super la gentoj. Dum ankoraŭ ses jaroj, tagon post tago, en la liturgiaj predikoj kaj la *satsang*-oj (spiritaj prelegoj<sup>3</sup>) li disdonas la fruktojn de sia kontemplado de *Sanjās*-ano (ĉion-forlasinto) absorbita en la mistero de la absoluto kiu estas pleneco de Estado (*Sat*), de Inteligento (*Ĉit*) kaj de Graco (*Ananda*<sup>4</sup>), la Dio Unu kaj Triobla (*Saĉĉidānanda*).

**P-ro I.H. DALMAIS o.p.**

(Emerita Profesoro pri "Orientaj Liturgioj", ĉe la Katolika Instituto en Parizo.)

1/ Aŝramo : loko dediĉita al spirita ekzercado, kaj malfermita al ĉiaj ver-serĉantoj.

*Saĉĉidānanda* : sanskrita nomo de la Triunuo unue uzita en tiu senco de Keŝab Ĉandra SEN kaj Svamio Brahmabandhu UPADHJAJ.

2/ Titolo de unu el liaj libroj (en la franca : "Expérience chrétienne et mystique hindoue", t.e. Kristana sperto kaj hindua mistikismo).

3/ Sanskrita kunmetaĵo : "kuniĝo kun la virtuloj (aŭ pri la realo)".

4/ Ekzakte : Ĝojo, feliĉo.



Pace iru laŭ via vojo,  
 tra bruo kaj hasto,  
 kaj memoru ke silento estas Paco.  
 Tiom kiom eblas, kaj sen mallevi  
 la kapon, **estu amika** kun viaj  
 samsepcianoj ; esprimu vian  
 veron, trankvile kaj klare ;  
**aŭskultu la aliajn**, eĉ la plej  
 enuigajn kaj la plej malklerajn :  
 ankaŭ ili havas ion por diri.  
 Fuĝu de homo kun laŭta kaj  
 aŭtoritatema voĉo ;  
 li pekas kontraŭ la Spirito.  
**Ne komparu vin kun la aliaj**,  
 timante fariĝi vana, aŭ amara,  
 ĉar, ĉiam, vi trovos pli bonan  
 aŭ pli malbonan ol vi.  
 Ĝuu viajn sukcesojn, sed ankaŭ  
 viajn planojn. **Anu vian laboron**,  
 kiom ajn maleminenta ĝi povus  
 esti, ĉar ĝi estas reala bono,  
 en necerta mondo.  
**Estu prudenta** en negocoj  
 ĉar la mondo estas trompa.  
 Sed ankaŭ ne ignoru  
 ke estas virto, ke  
 multaj homoj celas idealon kaj  
 ke heroeco ne estas tia raraĵo.  
**Estu vi mem** kaj ĉefe ne ŝajnigu  
 amikecon, ankaŭ ne alpaŝu amon  
 kun cinikeco, ĉar malgraŭ la  
 malfacilaĵoj kaj seniluziigoj  
 ĝi estas same vivema  
 kiel la herbo kiun vi tretas.  
 Klinigu antaŭ la neevitebla paŝo  
 de l'jaroj lasante, sen bedaŭroj,  
 junecon kaj ties plezurojn.  
 Sciu ke por esti forta, vi devas  
 prepariĝi sed ne lasu vin ekregi  
 de ĥimeraj timoj kiujn, ofte,  
 naskas laceco kaj soleco.  
 Enkadre de saĝa disciplino,  
 estu bona al vi mem.  
**Vi estas filo de l'universo**, tute  
 same kiel la arboj kaj steloj.  
 Vi havas lokon en ĝi.  
 Kion ajn vi povas pensi pri tio,  
 klare estas ke la universo daŭri-  
 gas sian iradon, kiel nepras.  
 Estu do en paco kun Dio, kiu ajn  
 Li povas esti laŭ vi ;  
 kaj kiuj ajn estas via tasko kaj  
 viaj aspiroj, en bruo kaj konfuzo  
**gardu vian animon en paco**.  
 Malgraŭ la fiaĵoj, la penoj,  
 la trompitaj revoj,  
 vivo ankoraŭ havas sian belecon.  
 Estu prudenta.  
**Provu esti feliĉa.**

Kiu ajn estas la religio kiun  
 oni instruis al vi, kiu ajn estas  
 la proceso laŭ kiu vi edukiĝis,  
 kiu ajn estas la maniero laŭ kiu  
 vi komprenis viajn majstrojn,  
 sur tiuj niveloj, **vi komprenos**  
 kaj proprigos al vi tiun mesaĝon.  
 Ne sufiĉas kredi je tiu mesaĝo.  
 Necesas vivi laŭ ĝi. Esenco de la  
**universala religio estas paco kaj vero**,  
 sorbigitaj de **amo kaj boneco** al ĉiuj  
 kreitaĵoj sur la tero. Tempo venis  
 esprimi tiun esencon en la persona vivo.  
 Vi devas komenci per vi mem kaj via  
 interna vivo. Vi volas plibonigi  
 la mondon ? Plibonigu vin, mia amiko ! \*  
 La mesaĝo de tiu kiu ne plibonigis sin  
 neniam inspiras pliboniĝon.  
**Amo estas ĉe la centro de ĉiu religio**,  
 kaj virto, kiu estas aganta amo,  
 estas la plenumigo de la religio.  
 Ne amu nur vian familion kaj la amikojn,  
 car **linigi amon estas nei ĝin !**  
 Serĉu la internan pacon kaj  
 la dian inspiron. Persistu tion fari ;  
 ne rezignu dum unu momento. Per via fido  
 kaj viaj agoj vi formas vian vivon kaj  
 vi helpas formi la vivon de la aliaj.  
 Kia respondeco ! En vi la spirito trovas  
 sian aganton kaj partneron ;  
**kion vi estas konscia pri tio,**  
**tion vi estos riĉigata.**  
 Vi havos revelacion, pli profundan  
 ol viaj revoj la plej ekzaltitaj.  
 La nova epoko tuj ekaperos, en kiu  
 oni ekkonscios pri la unueco de ĉio.  
 La malsamoj inter la religioj malaperos.  
 Kion bonan ili havas unuigis kaj fariĝos  
 la komuna celo de la homaro.  
 Sciu ke la elekto estas via. **Elektu amon**  
 prefere ol malamo, mildecon prefere ol  
 perforto, sanktecon prefere ol malbono ;  
 aŭdacu kredi ke la regno de amo kaj paco  
 alvenas. Estu preparita, estu virta en  
 ĉiu ago. Virto malfermas ĉiujn pordojn  
 kaj trans la pordoj troviĝas amo\*\*.  
 La dia inspiro invadu vian tutan vivon,  
 ĝin plenigante per rekompensoj pro la  
 ĉiutagaj plenumadoj, per trezoroj de  
 pripensata ekzistado kaj de la eterna  
 lumo de la atingita paradizo.

(Trovia en la preĝejo Sankta-  
 Paŭlo en Baltimore. Date 1693)

1/ Komparu kun "Ne kritiku la mondon,  
 plibonigu ĝin. - Kiel ? - Plibonigante  
 vin mem ĉiumomente." (Sri Chinmoy).

2/ Komparu kun "Amo, ŝlosilo por koni,  
 malfermas ĉiujn pordojn." (Gandhi)

SUD-Jaraj



## Vi, la kosma harpisto

Mi kaj mia hundo ne vivas en la sama mondo. Kelkfoje mia hundo ekscitiĝas pro iu flaro aŭ sono kiun mi tute ne rimarkas. Ĝi multaj aferoj kiujn ni ambaŭ perceptas ni tre diverse interpretas: pantoflo, ekzemple, estas por mi bona piedujo sed, bedaŭrinde, por la hundo ĝi estas dentoekzercilo. (Kaj tamen niaj mondoj havas komunajn punktojn: pri ĉokolado ekzemple ni tre simile reagis.)

Ni bone scias, ke homoj povas havi tre diversajn opiniojn pri la sama afero sed ankaŭ la perceptoj povas esti tre diversaj: kompare kun iu kiu bone konas birdojn aŭ florojn mi estas preskaŭ blinda en naturo, kaj parolado en nekonata lingvo estas, por mi, nura bruoj.

**La mondo estas kiel harpo** kun multegaj kordoj. Ĉiu vivanta estaĵo, laŭ siaj sensoj kaj cerbaj kapabloj plukas iujn kordojn kaj ne aliajn, tiel kreante la melodiojn kiuj estas la propra mondo.

La mondo, la universo, estas profunde neŭtrala (eĉ pli ol UEA). La senco de la mondo dependas de la individuo. Min tute diverse vidas amikoj, malamikoj kaj kuloj.

**Ni pensu plu pri la kulo.** Ĝiaj flugiloj estas ĝuste tiuformaj por ebligi al ĝi flugi tra la ĉirkaŭanta aero, kaj ĝia diabla pikilo estas tie ĉar ĝi konvenas por trapiki haŭton. Ĉiu parto de ĝi dependas de la medio. Kaj la medio dependas de ĝi: la araneoj kiuj ĝin kaptas, la plantoj kiuj recirkulas la CO<sub>2</sub> kiun ĝi elspiras, la homoj kiuj sakras...

Tiel vidante, ne eblas distingi inter la kulo kaj ties medio: ili formas kaj dependas unu de la alia. Ĉiuj estaĵoj, agoj kaj reagoj estas partoj de disfloranta tuto: ankaŭ vi kaj mi estas partoj de la medio el kiu ni "harpas" niajn proprajn realaĵojn.

**Vi kaj mi kreskas sur patrina tero, kiel pomoj sur arbo** - kaj same intima estas la rilato.

Foje vi sentas, ke vi agas libervole kaj foje, ke la medio, la sorto vin kaptas; sed la maniero laŭ kiu ni sentas, formas kaj influas la medion, kaj la medio sentas, formas kaj influas nin, tio estas ununura procezo.

Kaj tiu konscio povas ŝanĝi la humoron kaj senton de nia agado, samkiel ŝanĝo de voĉtono povas ŝanĝi la samajn vortojn de ordono al ĝentila peto.

Mi skribas laŭ la ideoj de **Alan WATTS**, konata interpretisto de orientaj filozofioj, kiu mortis antaŭnelonge, kaj li proponas ke ni provu konsciiĝi kaj senti la "fluon" de naturo, de ĉio, per simplaj ekzercetoj:

**Libera spirado, sen "regado".** Elspiru kaj lasu la postan enspiron veni de si mem, "kiam ĝi volas". Kaj denove el, kiam ĝi volas. Lasu tiel okazi dum kelkaj minutoj kaj rimarku kiel la spiroritmumo malrapidiĝas kaj iom fortiĝas de si mem sen ajna via peno: ĉar nun vi estas "kun" la spiro kaj ne ekster ĝi kiel "reganto".

**Libera sentado kaj pensado.** Spiru kiel supre kaj dume, provizore forgesu ĉiujn viajn filozofiajn, religiajn kaj politikajn opiniojn kaj estu kiel infano kiu scias nenion, nenion krom tio kion vi efektive aŭdas, vidas, sentas, flaras. Supozu ke ekzistas nur ĉi tie kaj nun: neniam estis aŭ estas alia tempo, nur nun. Simple konsciu pri tio kio efektive estas, sen doni nomojn kaj sen juĝi ĉar nun vi provas elsenti realon, ne ideojn kaj opiniojn pri ĝi. Ne provu subpremi la "babiladon" en via kapo; se ĝi ne kvietiĝas aŭskultu ĝin kvazaŭ ĝi estas trafikzumado aŭ la blekado de kokinoj. Lasu ke viaj oreloj aŭdu kion ili volas, ke viaj okuloj vidu kion ili volas, ke via menso pensu kion ĝi volas. Ne atendu specialan rezulton - en ĉi tiu senvorta, senidea stato ne estas celo, pasinto nek estonto. Nur haltu, rigardu kaj aŭskultu.

**Majk SADLER**



# Katarisma ritaro (sekvo)

Ricevo de la "Konsole"

(*Consolamentum*, aŭ spirita bapto)

Kaj se li devas esti tuj konsolata, li faru sian *melhorier*<sup>1</sup> kaj li prenu la libron<sup>2</sup> el la mano de la Maljunulo. Tiu ĉi devas admoni lin kaj prediki al li kun konvenaj *atestoj*<sup>3</sup> kaj kun tiaj paroloj kiuj konvenas al "Konsole". Li parolu jene :

"Petro, vi volas ricevi la spiritan bapton, per kiu estas donata la Sankta Spirito en la eklezio de Dio kun la sankta preĝado, per la surmeto de la manoj de la bonuloj. Pri tiu bapto Nia Sinjoro Jesuo-Kristo diras, en la evangelio de Sankta Mateo [28,19-20], al siaj disĉiploj: "Iru kaj instru al ĉiuj nacioj, baptu ilin en la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito. Instruu ilin observi ĉion kion mi ordonis al vi. Kaj jen mi estas kun vi por ĉiam ĝis la konsumiĝo de la ĉi-mondo." Kaj en la evangelio de Sankta Marko [16,15] li diras: "Iru en la tutan mondon, prediku la evangelion al ĉiu kreitaĵo. Kiu kredos kaj estos baptita, estos savita, sed kiu ne kredos estos kondamnita."

Li diras al Nikodemo en la evangelio de Sankta Johano [3,5]: "Vere mi diras al ci: neniu homo eniros la regnon de Dio se li ne renaskiĝas per la akvo kaj per la Sankta Spirito." Kaj Johano baptisto parolis pri tiu bapto kiam li diris [Jn 1,26-27 k Mt 3,11]: "Veras ke mi baptas per akvo, sed kiu estas venonta post mi estas pli forta ol mi: mi ne estas inda ligi la rimenon de liaj sandaloj. Li baptos vin per la Sankta Spirito kaj fajro." Kaj Jesuo-Kristo diras en la Agoj de la Apostoloj [1,5]: "Ĉar Johano baptis ja per akvo, sed vi estos baptitaj per la Sankta Spirito."

Jesuo faris tiun sanktan bapton de la surmeto de la manoj, laŭ kion raportas Sankta Luko, kaj li diris ke liaj amikoj faros ĝin, kiel raportas tion Sankta Marko [16,18]: "Sur la malsanulojn ili

metos la manojn, kaj la malsanuloj estos sanigitaj. Ananias faris tiun bapton al Sankta Paŭlo [Agoj 9,17] kiam tiu ĉi konvertiĝis. Kaj poste Paŭlo kaj Barnabas ĝin faris en multaj lokoj. Kaj Sankta Petro kaj Sankta Johano faris ĝin sur la Samaritanojn. Ĉar Sankta Luko jene diras en la Agoj de la Apostoloj [8,14-17]: "Kiam la apostoloj kiuj estis en Jerusalemo eksciis ke tiuj de Samario ricevis la parolon de Dio, ili sendis al ili Petron kaj Jonanon kiuj tien alveninte preĝis por ili, ke ili ricevu la Sanktan Spiriton, ĉar ankoraŭ en neniu el ili ĝi malsuprenvenis [...]". Tiam ili metis la manojn sur ilin kaj tiuj ĉi ricevis la Sanktan Spiriton."

Tiun sanktan bapton per kiu la Sankta Spirito estas donata, konservis la Eklezio de Dio, de la apostoloj ĝis hodiaŭ, kaj tiu venis de "bonuloj" en "bonulojn" ĝis ĉi-tie, kaj ĝi tion faros ĝis la fino de l' mondo.

Kaj vi devas aŭdi ke povo estas donita al la Eklezio de Dio ligi kaj malligi, pardoni la pekojn kaj reteni ilin, kiel la Kristo diras en la evangelio de Sankta Johano [20,21-23]: "Kiel la Patro sendis min, tiel mi ankaŭ sendas vin. Kiam li estis dirinta tion li blovis sur ilin kaj diris al ili: Ricevu la Sanktan Spiriton; kies pekojn vi pardonas, al tiuj ili estos pardonitaj, kaj kies vi retenos, ili estos retenitaj."


Kaj en la evangelio de Sankta Mateo, li diras al Simono-Petro [16,18-20]: "Mi diras al ci, ke ci estas Petro, kaj sur tiu roko mi konstruos mian eklezion kaj la pordegoj de la infero ne havos forton kontraŭ ĝi. Mi donos al ci la ŝlosilojn de la Regno de l'ĉieloj, kaj kion ajn ci ligos surtere, tio estos ligita en la ĉieloj, kaj kion ajn ci malligos surtere, tio estos malligita en la ĉieloj."



Li diris al siaj disĉiploj en alia loko [Mt 18,18-20]: Vere mi diras al vi, kion ajn vi ligos surtere, tio estos ligita en la ĉielo, kaj kion ajn vi malligos surtere, tio estos malligita en la ĉielo. Kaj denove vere mi diras al vi: se du el vi kuniĝas surtere ĉio, kion ajn ili petos, estos donita de mia Patro kiu estas en la ĉielo. Ĉar kie estas du aŭ tri homoj kuniĝintaj en mia nomo, mi estas tie meze de ili.

### 750-a datreveno de la martiriĝo de 200 kataristoj

Rifuĝintaj en la kastelo Montségur (Suda Francio), ili estis mortbruligataj la 16-3-1244.



El mezepoka manuskripto

Kaj en alia loko [Mt 10,8], li diras: Sanigu la maisanulojn, relevu la mortintojn, purigu la leprulojn, elpelu la demonojn."

Kaj en la evangelio de Sankta Johano [14,12], li diras: "Kiu kredas al mi faros la farojn kiujn mi faras." Kaj en la evangelio de Sankta Marko [16,17-18] li diras: "Sed kiuj kredos tiujn signojn sekvos ilin: en mia nomo ili elpelos la demonojn, kaj ili parolos novajn lingvojn kaj ili forlevos la serpentojn, kaj se

ili trinkos iun mortigan trinkaĵon, tio ne okazigos malbonon al ili. Ili metos la manojn sur la maisanulojn kaj tiuj estos sanigitaj." Li ankoraŭ diras en la evangelio de Sankta Luko [10,19]: "Jen mi donis al vi la povon piedpaŝi sur serpentoj kaj skorpioj, kaj sur la tuta forto de la Malamiko, kaj nenio vin nocos."

Se vi volas ricevi tiun povon kaj tiun potencon, decas ke vi gardu ĉiujn ordonojn de la Kristo kaj de la Nova Testamento laŭ via povo. Kaj sciu ke li ordonis ke la homo ne adultu nek mortigu nek mensogu; ke li ne ĵuru ian ĵuron, ke li ne prenu nek ŝtelu, ke li ne faru al la aliaj kion li ne volas estis farata al li<sup>5</sup>, kaj ke la homo pardonu al kiu faras al li malbonon, kaj ke li amu siajn malamikojn, kaj ke li preĝu por siaj kalumniantoj kaj por siaj akuzantoj kaj benu ilin. Se oni irapas lin sur vangon, li prezentu la alian kaj se oni forprenas de li lian gonelon [ia tuniko] li lasu ankaŭ la mantelon; ke li ne juĝu kaj ne kondamnu [vd Lk 6,37]; kaj multajn aliajn ordonojn kiuj estis ordonitaj de la Sinjoro al lia Eklezio.

Ankoraŭ decas ke vi malamu tiun ĉi mondon kaj ties farojn, kaj ankoraŭ la aĵojn kiuj estas ties. Ĉar Sankta Johano diras en la epistolo [1 Jn 2,15-17]: "Ho miaj karegaj, bonvolu ne ami la mondon nek tiujn aĵojn kiuj estas en la mondo. Se iu amas la mondon, la Karitato al la Patro ne estas en li. Ĉar ĉio kio estas en la mondo estas dezirego de la karno, dezirego de la okuloj kaj fiereco de la vivo, kiu ne estas de la Patro, sed estas de la mondo; kaj la mondo forpasos kaj ankaŭ ĝia dezirego, sed kiu plenumas la volon de Dio eterne restas."<sup>7</sup> Kaj Kristo diras al la nacioj [Jhn 7,7]: "La mondo ne povas malami vin, sed ĝi malamas min, ĉar mi atestas pri ĝi ke ĝiaj faroj estas malbonaj."

Estas skribite en la libro de Salomono [Pred. 1,14]: "Mi vidis ĉiujn aferojn kiuj fariĝas sub la suno, kaj jen ĉiuj estas vantaĵoj kaj mensaj turmentoj."<sup>8</sup>



Kaj Judaso, frato de Jakobo, diras por nia instruigo en la epistolo [Judaso 23] : "Malamu tiun makulitan veston kiu estas karna." 9

Pro tiu atestoj kaj pro multaj aliaj, decas ke vi observu la ordonojn de Dio, kaj ke vi malamu tiun ĉi mondon. Kaj se vi bone faras tion ĝis la fino, ni havas la esperon ke via animo havos la eternan vivon.

La kredanto tiam diru : "Mi havas tiun ĉi volon, preĝu al Dio por mi, ke li donu al mi la forton por tio ĉi."

Poste, la unua el la "bonuloj" faru, kun la kredanto, sian *melhorier* al la Maljunulo, kaj li diru : "Parcite nobis 10. Bonaj kristanoj, ni petas vin pro la amo de Dio doni al nia amiko, ĉi tie ĉeestanta, el tiu bono kiun Dio donacis al vi."

Poste la kredanto devas fari sian *melhorier* kaj diri : "Parcite nobis. Pri ĉiuj pekoj kiujn mi age aŭ dire aŭ pense aŭ iel ajn faris mi petas pardonon de Dio, de la Eklezio kaj de vi ĉiuj."

La Kristanoj tiam diru : "De Dio kaj de ni kaj de la Eklezio ili estu pardonitaj al vi, kaj ni preĝas al Dio ke li pardonu al vi."

Kaj post tio ili devas **konsoli** lin.

La Maljunulo prenu la libron [de la evangelioj] kaj metu ĝin sur lian kapon, kaj la aliaj bonuloj ĉiu sian dekstran manon, kaj ili diru la *parcias*<sup>11</sup> kaj tri "Adoremus"<sup>12</sup> kaj poste : "Pater sancte, suscipe servum tuum in tua justitia, et mitte gratiam tuam et spiritum sanctum tuum super eum." [Patro sankta, akceptu cian servanton en cia justeco, kaj sendu cian gracon kaj cian sanktan spiriton sur lin].

Ili preĝu al Dio per la Preĝo [la Patro Nia], kaj la gvidanto de la diservo devas diri la "seson"<sup>13</sup> kaj kiam la seso estos dirita, li devas diri tri "Adoremus" kaj la Preĝon unufojon laŭte, kaj poste la evangelion [laŭ Johano].

Kaj kiam la evangelio estos dirita, ili devas diri tri "Adoremus" kaj la "Gratia" kaj la *Parcias*. Poste ili devas fari la pacon [kisi unu la aliajn] inter si kaj kun la libro<sup>14</sup>.

Se estas "kredantoj" ili preĝu al Dio per duo [du "Patro Nia"] kaj kun *veniae*<sup>15</sup>, kaj la ceremonio estos finita ■

1/ Riverencego, vidu noton 2 en Asistilo n-ro 13, p.13.

2/ Plejversajne temas pri evangeliaro, sed eble pri la Nova Testamento aŭ eĉ la tuta Biblio.

3/ El la Nova Testamento.

4/ Ĉi tie estas preterlaso de la jena frazo el Agoj : "ili nur baptigis en la nomon de la Sinjoro Jesuo".

5/ Vidu Mt 5,21-48, komentarianta Eli-ron 20,7-17 kaj Levidojn 19,11-18. Ni atentigas ke ĉi tie la "ora regulo" estas prezentata en negativa formo anstataŭ la pozitiva formo de Mt 7,12 ("Ĉion ajn kion vi deziras ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ faru al ili", trad. de la "Londona Biblio"), tradukita de Zamenhof : "Agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi". (Deklaracio pri Homaranismo, 1913, X,b; vidu ankaŭ lian "Deklaracio de Hilelisto", 10,b; kaj esperantistan provon de ties aktualigo en la Marburga Manifesto, 1985, "Fundamento de Homaranismo", art.2 (en *Survoje al Ponta Kulturo*, red. de H. Welger, Info-Servo kaj Homarana Asocio, 1987, p.19-20, "Nova Sento" n-ro 2).

6/ La du substantivoj anstataŭ nur : "persekutantoj".

7/ Ankaŭ ĉi-citaĵo estas pli proksima al la Vulgato ol al la greka originalo.

8/ La kutima teksto estas : "... kaj entreprenoj ventaj" (trad. de la Londona Biblio) aŭ "...kaj kurado post vento".

9/ Traduko de la "Londona Biblio" : "malamante eĉ la veston makulitan de la karno".

10/ "Kompatu nin", en la latina : vidu noton 5 en n-ro 12 p.18.

11/ De mi nekonata nomo de preĝo en la latina; eble tutsimple serio da "Parcite nobis" ?

12/ "Ni adoru (la Patron kaj la Filon kaj la Sanktan Spiriton)".

13/ Tre probable ses "Patro Nia".

14/ Probable kiel orient-kristanoj kisas la ikonojn.

15/ Vidu noton 10 en n-ro 13 p.13.



## Ni memoru Simone Weil

Antaŭ 50 jaroj , la 24-an de aŭgusto 1943 , mortis Simone Weil , en Ashford (Anglio) (...). Nur la postmorta publikigo de sia verkaro, kelkajn jarojn poste , rivelis sian nekompareblan penson kaj karakteron .

Juddevena , ŝi havis la francan filozofon Alain kiel instruanton\* kaj studis ĉe la supera normala lernejo (en Parizo) , kaj fariĝis profesoro pri filozofio. Tre frue ŝi engaĝiĝis en siatempajn politikajn kaj sociajn luktojn, laboris en manufakturo, eĉ faris mallongan restadon en Hispanio plagata de la intercivitana milito. Sed la ĉefa afero de ŝia vivo estis la spirita sperto kiu igis ŝin kaptita de la Dio el amo.

" Ĉiu religio estas la sola vera " , ŝi asertis en tiuj fulmaj paradoksoj dissemataj en ŝiaj tekstoj . Ŝia verkaro , fragmenta kiel tiu de Blazio Paskalo, diras en senornama kaj luma stilo la serĉadon de animo kaptita de la absoluto. De la ĉefa meditado pri la "atendo de Dio" Simone Weil disvolvigas ĝeneralan pripensadon pri la moderna mondo , politiko, historio , religio, kulturoj, laboro, arto, kaj ilia situacio en la epoko de la malĉeesto de Dio, kaj de nihilismo . Iranta ĝis la fino de la vojo de nudiĝo kaj de graco, ŝi akordiĝis per sia alteco kun la ĉiutempaj verserĉantoj. Ŝia anakronisma penso restas preskaŭ neaŭdata de la epoko , la nia , kiu ne ĉesas droni en la perdo de la esenca . La voĉo de Simone Weil , unu el la plej fortaj , unu el la plej puraj en tiu ĉi jarcento , egaligebla kun tiuj de la plej grandaj homoj , al kiu ĝi parolas duon-jarcenton post kiam ĝi malaperis ? Ĝi restadas inter ni kiel sekreta fonto, tuta el travidebleco , el profundeco kaj el malsoifiga freŝeco por nia tempo de ĝeneraliĝinta konsterno.



(...) La verko de Simone Weil estas la ideala vojnutraĵo por transpasi la sojlon de la nova jarmilo . Simone Weil : "nutraĵo el lumo" por hodiaŭ kaj morgaŭ.

Ĉu nia nuna tempo scios , ke "estas nur unu kulpo : ne havi la kapablecon nutri sin per lumo" ?

Ĉu ĝi finfine scios saluti , 50 jarojn post ŝia malapero, la malfortikan kaj inkandeskan mesaĝistinton de la "vereco de Amo" ?

**Pierre Judide**  
("Pour saluer Simone Weil",  
en *La Croix*, aŭgusto 1993)

\* Ŝia tiama kunstudanto , la kristana filozofo Etienne Borne , mortis en junio 1993. Li fondis la revuon "France-Forum" kaj estis ĝenerala sekretario de la Katolika Centro de la francaj intelektuloj.



## La pezeco kaj la graco\*

Simone WEILL

Dio donis al mi la eston por ke mi redonu ĝin al li. Tio estas kiel iu el tiuj provoj kiuj similas kaptilojn kaj kiujn oni trovas en la fabeloj kaj la rakontoj pri inicado. Se mi akceptas tiun donacon, ĝi estas malbona kaj fatala; ties virto aperas per la rifuzo. Dio permesas al mi ekzisti ekstere de li. Miaflanke mi devas rifuzi uzi tiun permeson.

Humileco estas la rifuzo ekzisti ekstere de Dio. Reĝino de la virtoj\*\*.

La mio estas nur la ombro ĵetita de la peko kaj la eraro kiuj la lumon de Dio baras, kaj kiun mi prenas por estaĵo.

\* \* \*

Ni volus ke ĉio valora estu eterna. Nu ĉio valora estas la rezulto de renkonto, daŭras per renkonto kaj ĉesas kiam disiĝas kio renkontiĝis. Tio estas la ĉefa penso de budhismo (heraklita penso). Ĝi kondukas rekte al Dio.

La pripensado pri la hazardo kiu igis mian patron kaj mian patrino renkontiĝi estas ankoraŭ pli saviga ol tiu pri morto.

Ĉu estas ĉe unu io en mi kiu ne havas sian originon en tiu renkonto? Nur Dio. Kaj eĉ mia penso pri Dio havas sian originon en tiu renkonto.

Steloj kaj florantaj fruktaroj. La perfekta konstanteco kaj la ekstrema fragileco egale donas la senton de eterneco.

\* \* \*

La eterna lumo donu ne kialon vivi kaj labori, sed plenecon kiu evitigas serĉi tiun ĉi kialon.

\* Parizo : Union Générale d'Éditions, 1962, p.48, 110-111, 180.

\*\* En la franca kaj la latina, la virtoj estas "inaj", kaj eĉ ofte reprezentitaj en la formo de virinoj.

## 300-jariĝo

Multaj nun konas ilin kun iliaj larĝaj rondaj ĉapeloj kaj barboj, pro *Witness* ("Atestanto", filmita de Peter Weir en 1984). Tiu simpatia sekto naskiĝis de skismo de Jakob Amman en 1693: "Amish" signifas Amman-anon.



### Rebaptistoj (Anabaptistoj)

La prahistorio de la Malnova Ordeno de la Amiŝoj komenciĝas do multe pli frue, en 1525 en Zuriko per unua skismo inter la reformaciisto Ulrich Zwingli kaj pluraj el liaj disĉiploj: tiam la eksa katolika pastro George Blaurock estis rebaptata de Conrad Grebel, ĉar la manifestiĝo de tiu nova religio estis la bapto nur de plenkreskuloj, do dua bapto por la jam infane baptitaj. Tial ilia nomo anabaptistoj (rebaptistoj). La kontestantoj volis kompletan malpermeson de ĉia ligilo Eklezio-ŝtato. (Neniu Eklezio tiam povis imagi apartigi la unu de la alia).

### Menanoj (Mennonitoj)

Al tiu movado, kiu predikis la tujan alvenon de la miljara regno de Dio (kaj provokis preskaŭ dujaran revolucion en Munster en la 1530-aj jaroj), aliĝis la eksa katolika pastro Menno Simons. Lia influo disvolviĝis en Nederlando kaj en Rejna kaj suda Germanio. Li puŝis antaŭen la neperfortan logikon de la movado kaj organizis la komunumojn, kaŝitaj kaj persekutataj same de la katolikoj



## de la Amiŝoj

kiel de la protestantoj. Politike ilia rifuzo ĵuri, uzi armilojn, igis ilin esti rigardataj kiel malamikoj de socio kie ĉiu akceptis la religion de la princo. Tiuj nederlandaj pacistaj kaj evangeliaj anabaptistoj unuafoje estis nomataj "mennonitoj" - aŭ pli esperante "Mennanoj" - de la frisa regentino en 1544.

### Amiŝa historieto

En 1693, la svisdevena Jakob Amman apartiĝis de la svisaj idoj de la unuaj menanoj, kiujn li akuzis pri malsevereco: li kaj liaj anoj rifuzis manĝi kun nekomunumanoj, ĉar ili volis havi nenian ligilon kun "la mondo". Tiu strikta apartiĝo fariĝis ĉefa karaktero de la amiŝoj, krome de ilia pacismo. Ili apartiĝis ankaŭ per eksmodaj vestoj.

Ekde 1712, kiam la "sunreĝo" Ludoviko la Dekkvara elpelis ilin de Francio, ili ekmigris al la *Nova Mondo* kie sole restas amiŝaj komunumoj, ĉefe en Pensilvanio (fondita de la kvakero William Penn, 1644-1718\*), kies 130.000 enloĝantoj (el la c. 12 milionoj) estas amiŝoj. Dua ĉefa migrado okazis pro la franca revolucio, en 1790, por eviti devigan milit-servon.

*"Oni ofte riproĉas la amiŝojn rifuzi la [teknikan] progreson sed fakte ili evoluas, eĉ se la ŝanĝoj povas aspekti tre malrapidaj"*, klarigas Martine Ropp, alzaca menanino de la franca asocio de rebaptista-menana historio.

Internacia kolokvo en la alzaca devenloko de la Malnova Ordeno, Sainte-Marie-aux-Mines [Sankta-Maria-ĉe-la-Minoj] estis la okazo por kelkaj amerikaj amiŝoj revidi la landon de siaj prauloj, danke al aviadiloj kaj aŭtoĉaroj.

Benedikto Vandeputte

(El *La Croix*, 26-8-1993, p.13)

\* Ni petas do niajn kvakerajn amikojn sendi al ni artikolon pri li okaze de la 350-a datreveno de lia naskiĝo! Antaŭdankon.

Religio ne estas por la amiŝoj parto de iliaj agadoj, ĝi eniras ĉion. De ĝi dependas la valoroj kiujn ili observas, kaj ilia vivmaniero. La ĉefaj punktoj de la amiŝa kredo estas neperforto, apartiĝo disde la mondo, rifuzo de la monda konformismo, abnegacio, obeo al la Eklezio kaj al la vero, adopto de la Kristo kiel modelo de la moralo.

La amiŝoj forĵetas la kalvinan antaŭdestinisman, same kiel faras la aliaj menanoj, kaj la Wesleyan doktrinon de la certeco esti savita. Nur la tagon de la Juĝo, la kredanto scios ĉu li estas savita kaj ĝis tiu tago lia devo, kiel pilgrimo kaj fremdulo en la lando de la "Gentoj" (la resto de la kristanaro!), estos obei kaj apartiĝi disde la mondo: nur tiel li povos vivi "en la espero". La komunumo estas la nura medio kie hono povas esperi la savon.

Amiŝoj forĵetas plejparton el la akcesoraĵoj de la civilizacio, ties dekoracio, ties ceremonioj, ĉiuj mondaj amuzoj (inkluzive kartludojn kaj kolektivajn ludojn), muzikiloj, grandaj speguloj, fotoj, viraj har-tradividoj, virinaj bukloj kaj ondumoj. Ili volas nek asekuojn nek ŝtatajn subvenciojn al agrikulturo nek bonfaradajn monhelpojn.

Sed kelkaj komunumoj permesas la personan uzadon de iuj maŝinoj kiel la aŭtomobilo, kvankam preskaŭ ĉiuj ignoras la ŝarĝveturilojn kaj la traktorojn, kaj daŭrigas uzi siajn ĉevaltiratajn "boĝiojn" kaj iom rudimentajn agrikulturajn teknikojn. Ili tamen akceptis elektron en siaj laborejoj sed ne en la hejmoj.

Ili estas multe pli proksimaj al la naturo ol eĉ la aliaj agrikulturistoj. Unuaj ekologiistoj, la amiŝaj familioj estis bonegaj farmantoj, ĝuintaj en la pasinteco serĉatecon de la grandbienuloj kiuj konfidis al ili siajn farmobienojn.

Bryan Wilson

*Les Sectes religieuses*, 1970, p.130-131.

\*\* La vorto ekzistas en PIV, sed specialigita por trajna framo, senco verŝajne devenanta de tiuj XVIII-jarcentaj ĉaroj; fr. "boguets", angle "buggies".



## Dum la Konferenco pri Homrajtoj !

La 14-an de junio 93, la tagon mem de la malfermo en Vieno de la UNa Konferenco pri Homrajtoj, 12 monaĥinoj, inkluzive unu 15-jaran (la plej aĝa estas 25-jara), estis arestataj en la monaĥinejo Garu, 5 km for de Lhasao. Ili ĵus estis kondamnataj al 7-jara mallibereco pro supozita partopreno en por-sendependa manifestacio. Ili estis transportataj al la prizono Drapĉhi norde de Lhasao, kie jam estas 32 aliaj monaĥinoj el Garu, 5 el aliaj monaĥinejoj, kaj 124 monaĥoj. "Reedukadaj" skipoj, konsistantaj el membroj de la Komunista Partio, estis senditaj de la ĉinaj aŭtoritatoj en la monaĥinejon Garu, por trimonata "labor-kunveno".<sup>1</sup>

## 1700 soldatoj pro laŭtaj monaĥoj

La 5-an de julio, soldatoj arestis pli ol 35 homojn en la monaĥejo de Sangrabling kaj Dunbu Ĉokor apud la vilago Kjimsi, sude de Lhasao. Post arestado de monaĥoj kiuj laŭte kriis sendependemajn sloganojn okaze de antaŭbalota kunveno, la vilaĝanaro ribelis. 1700 soldatoj ĉirkaŭis la vilaĝojn Kjimsi, Nemo kaj Sangrabling. La kamparanoj estis atakintaj kaj renversintaj la policveturilon kiu transportis du kaptitajn monaĥojn. La sekvan tagon kvar homoj estis arestitaj de la polico (...). La 6-an de julio la enloĝantoj sendis al UNO alvokon kiu estis transdonita al la respondeculo pri urĝaj agoj en Genevo. (...) En Nov-Delĥio la Dalai-Lamao reiris en julio, ke "lia ĉefa misio estas savi la tibetan kulturan heredaĵon hodiaŭ en granda danĝero".<sup>2</sup>

## La ĉina registaro petas ...serĉi reenkarnejon

Tibeta delegacio estis akceptita en Pekino la 13-an de julio, gvidata de Sonam Topgjal, la prezidento de la Kaŝag (la Tibeta Parlamento-en-ekzilejo). Alia ĉe-

fa delegaciano estis la frato de la Dalai-Lamao, Gjalo Thondup.

Esperige estas ke la ĉinoj pri-skribis la interparoladojn kiel "oficialajn". Kaj S-ro Rai Singh komentarias en *Times of India* :

*"Eble tio estas kio kondukis la Dalai-Lamaon diri, la 12-6-93, ke estis pozitiva ŝanĝo en la ĉina sinteno kontraŭ li"*.

Krom tiu nereakta ĉina rekono de la Kaŝag, neniu grava rezultato estis gajnita, sed la ĉina registaro faris la peton al la Dalai-Lamao, ke li partoprenu en la serĉado de la reenkarnejo de la Panĉhen-Lamao<sup>3</sup>. La antaŭa reenkarnejo, kvankam trude kondukita kaj "reedukita" en Pekino, daŭre rezistis ĝis sia morto, ekzemple kontraŭ la projekto de malplenigo de la "Turkisa lagego" (Jamdrok Tso) por hidroelekto.<sup>4</sup>

## Senluziigo de la Dalai-Lamao ?

La 24-an de oktobro la Dalai-Lamao diris ĉe sia alveno al Parizo : "Nia delegacio povis iri al Pekino [en aŭgusto] sed la ĉina sinteno ne ŝanĝetiĝis, eĉ unu colon. Des pli ke mi ĵus eksciis la arestadon de pluraj centoj da intelektuloj en la tibeta provinco Amdo. Mi daŭre petas la ĉinojn pri plena aŭtonomeco."<sup>5</sup>

## Ĉinoj kurage subtenas tibetanojn

Movado de ĉinaj "skismuloj", la Ĉarto por la Paco, estis fondita la 14-an de novembro en Pekino. Ma Ŝaohua, eksa gvidanto de la "Pekina Printempo" en 1989, insistis pri la problemoj de la naciaj minoritatoj, pli kaj pli eksplodemaj kaj kapablaj okazigi "ĝeneralan ribelon" :

*"Vi vidis kun kia perforto estis subpremitaj la ĵusaj manifestacioj de islamanoj en Kinghai [tibeta Amdo]. Kaj en Tibeto, estas vera kultura invado. La Tibetanoj ne havas religian liberecon."*

La tagon post tiu deklaro, oni anoncis la malaperon de Ma Ŝaohua verŝajne kaptita de la polico.<sup>6</sup>



## Al protektado de Tibeto ?

Post renkonto , la 15-an de novembro , de la reprezentantoj de la grandaj religioj en Lurdo (Maria sanktejo en Pireneoj , Francio) , la Dalai-Lamao , la sekvan tagon , lanĉis alvokon por ke "la tuta Lhasaa valo kaj multaj aliaj naturejoj kaj historiaj monumentoj" estu metitaj sub la protektado de internacia konvencio, laŭ la rekomendo de internacia scienca kolokvo (en oktobro en Parizo, kun temo "Tibeto, la 3-a poluso : Medio kaj popolo de Tibeto" 7).

Siaflanke , ekzemple , Bharato, per sia departemento "Archaeological Survey of India" ( Arkeologia Superrigardo de Bharato ) plenumis gravan konservan laboron pri la stupao ĉe Tisserru , la plej granda en Ladakho . (Ties konstruado estas atribuita al la unua reĝo de Leh , Gragspa Bumde (1400-1450) , kaj nur post ĝi Leh fariĝis la konstanta ĉefurbo de Ladakho) ; kaj pri la monaĥejo ĉe Alĉi kaj la Gompa-oj (iaj monaĥejoj) ĉe Phjang , Lamajuru kaj Thiksaj en la sama regiono.<sup>8</sup>

Jam komence de 1993 raporto estis liverata al UNESKO kun konkluda peto pri :

- registrado de iuj monumentoj kaj de la tuta situaĵo kie ili staras ( kiel la Potala kaj la malnovaj kvartaloj kiuj ĉirkaŭas ĝin , nuntempe detruataj ) , kiel monda kultura heredaĵo\*.

- kunlaborado por la restaŭrado de monumentoj kaj verkoj kun tibetaj fakuloj en spirito de respekto al la kulturaj trezoroj.

- trejnado de tibetaj esploristoj kaj fakistoj kun helpo de okcidentaj universitataj institucioj kiuj pretas oferi sian kunlaboradon.

La urĝeco de internacia kunlaborado por savi la tibetan kulturan heredaĵon devus esti senprokraste rekonata de la respondeculoj de UNESKO kaj de ties membroŝtatoj.<sup>9</sup>

La 1-an de oktobro la reprezentantino de la Prezidento de la

franca Respubliko , S-ino Bettina LAVILLE , "konsekris" Tibeton "spirita eko[logi]-sistemo" kaj akceptis la ideon pri urĝa plano, adaptita al iuj landoj, kiu povus esti "transponota" al Tibeto. <sup>10</sup>

---

## Atesto de S-ino Mitterrand , edzino de la Franca Prezidento

"Mi multfoje renkontis kaj aŭskultis , laste pasintan semajnon en la sidejo de "France Libertés" (Francio-Liberecoj) en Parizo, la ateston de tibetaj monaĥoj , kiuj estis arestitaj , malliberigitaj kaj torturitaj pro tio ke ili manifestaciis en Lhasao por la respekto de homrajtoj en sia lando, Tibeto." El letero de Danielle Mitterrand , prezidantino de la Fondaĵo France-Libertés , al S-ro Lodi Gjari, prezidanto de "International Campaign for Tibet" <sup>12</sup>.

---

## La tagon de Homrajtoj

Manifestacioj postulantaj sendependecon okazis en Lhasao la 10-an kaj 11-an de decembro, datreveno de la Universala Deklaracio pri Homrajtoj . Pafoj estis aŭdataj kaj monaĥinoj estis arestitaj. ( Entute 39 manifestacioj por sendependeco okazis en Tibeto dum la jaro 1993.) <sup>13</sup>

---

## En la internacia urbo Aŭrovilo

La 22-an kaj 23-an de decembro, la Dalai-Lamao probable inaŭguris projekton de Domo de Tibeto en Aŭrovilo, en la sud-bharata teritorio de Pondiĉero. <sup>14</sup>

---

## Eŭropaj vizitoj de la Dalai-Lamao

En Francio de la 24-a de oktobro ĝis la 16-a de novembro 1993. El lia densega programo ni nur ĉerpas kelkajn prelegojn : en Grenoble , "Sciencoj , Naturo kaj Konscienco" ( ĉe la Scienca Universitato ) kaj "Homrajtoj kaj Malperforto" ; kaj lia longa instruado ĉe la "Vaĝra Joganino"-Instituto apud Tuluzo per 5-taga komentariado de budhista teksto, sekvita de inicado.



### Venontaj :

- En Italio de la 30-a de majo ĝis la 3-a de junio.
- En Marsejlo (Francio), komence de decembro 1994 (invitita de la urbestro).
- En Barcelono (Katalunio), de la 11-a ĝis 19-a de decembro 94 : inicado pri Kalaĉakra. (Informoj: Organiza Komitato Kalacakra 1994, Sepulveda 45-47 , SP-08015 Barcelona, Hispanio) ■

## "Domo de Esperanto"

La projekto pri nova vilago por tibetaj infanoj apud Ladakho jam kolektis sufiĉe da mono por tute efektiviĝi , ĉefe dank al kontribuego de aŭstria porinfana asocio. La modesta sed tre dankoveka kontribuo de samideanoj el almenaŭ Aŭstralio , Francio , Kanado, Nederlando kaj Slovakio atingis 1.610 FrFr (ĉ. 540 gld) , t.e. 27 "ŝtonoj" el la 1.000 kiuj "konsistigas" unu domon.

Ne sufiĉe do por doni nomon al domo ; sed *la nomo de ĉiu doninto (entrepreno, asocio aŭ individuo) estos menciita en la libro pri la konstruado de tiu vilago de la solidareco , kaj skribita sur la domo mem* . Pri asocioj, aperos do : Universala Esperanto-Asocio , " Monda Kunagado " kaj ASISTI ■

## Letero

Senica, 5-6-1993

Ĉefe mi dankas al vi por informoj pri Tibeto , kiuj sincere interesas min . Mi komprenis , ke [gravas] ne nur kono de tibeta lingvo kaj de tibeta eksterordinara kulturo , sed ke nun ĉefe helpon bezonas tibetaj homoj . Mi povas iomete helpi laŭ miaj eblecoj malgraŭ tio ke mi ne estas riĉulino - materiale. Se vi konas manieron helpi Tibeton , mi tre petas vin pri sciigo.

Lubica Rehusova

Respondo : vidu la ĉi-apudan peticion, verkitan de bhutana lamao.

### Peticio pri Homrajtoj

*Bonvolu (foto)kopii , subskribi(gi) kaj resendi al la redakcio, kiu transsendos.*

Konsiderante la jenon :

Ekde 1959 Ĉinio okupas Tibeton. Plejparto el la monaĥejoj estis detruitaj kaj sanktaj objektoj forportitaj al Ĉinio . Nuntempe la situacio en Tibeto estas tre premita pro tio ke gemonaĥoj estas malliberigataj sen iu ajn alia kialo ol tiu ĉi : ke ili volas vivi kiel monaĥoj . Al ili estas trudate, vivi familian vivon aŭ morti, kaj multaj el ili elektis la morton, kaj la resto fuĝis al ekzilejo . Ĝuse , ĉirkaŭ 12 gemonaĥoj (inter 18- kaj 50-jaraj) estis malliberigataj ; ili estis torturataj kaj seksperfortataj laŭ Kriminala Kortumo (ekzemple en la prizono Drapĉhi norde de Lhasao).

Ni , ĉi-sube subskribantoj , postulas de la ĉina registaro , ke ĝi protektu la rajtojn de la tibetaj budhistoj en Tibeto kaj specife : 1/ Ke ĝi redonu la posedaĵojn kiuj estis konfiskitaj de la ĉina registaro. 2/ Ke ĝi garantii ĉiujn homrajtojn laŭ internacia leĝaro por ĉiuj civitanoj de Tibeto ■

### Notoj

- 1/ Laŭ TIN, la londona pri-Tibeta Int. Informreto , pere de "LT" , *La Lettre du Tibet*, 15 kaj 18 (jan. 1994), p.4.
- 2/ Laŭ artikolo de Douglas BURN , en julia numero de *La Croix*.
- 3/ Abato de Taŝi Lhunpo , kaj dua plej grava spirita - kaj politika - ĉefo en Tibeto, mortinta antaŭ jam pluraj jaroj.
- 4/ Vidu *VERDire* , n-ro 9 kaj 10, 1993. Fontoj : TIN-LT 15 , sept.93 , kaj *Times of India*, Delhi, 26-8-93.
- 5/ Sed verŝajne , ĉi-foje , temis pri islamanoj. El *La Croix*, 26-10-1993, p.7.
- 6/ LT n-ro 17, decembro 1993, p.2.
- 7/ Vidu *VERDire*, 13, 1994 , mendebla : J.C.Thumerelle, rue Pierre de Simpel 10, B-7784 Warneton. (Laŭ LT 17, p.1).
- 8/ Laŭ artikolo de Sanjay KAW en *Times of India*, 26-8-93, p.16 .
- 9/ LT, marto 1993, p.4 .
- 10/ Laŭ LT n-ro 16 , p.4 . En 1993 , 29 kulturaj monumentoj kaj kvar naturejoj estis registritaj sur la Uneska listo de la "Monda Heredaĵo de la Homaro", en kiu nun estas 407. (Laŭ *Unescopie*, jan. 94).
- 12/ Let. integre reprod. en LT 17, p.4.
- 13/ LT n-ro 17, dec.93, p.2 .
- 14/ Pri ĝi vidu en *Asistilo* 1, p.4-5 .



## Edziĝintaj katolikaj pastroj

*Ne longe post la UK en Valencio :*

400 edziĝintaj katolikaj pastroj partoprenis, en lasta aŭgusto, en sia tria internacia kongreso, en Madrido . Ili riproĉas la katolikan Eklezion , ke ĝi estas malcedemega kontraŭ ili malpermesante al ili la sacerdotadon, kaj petas revizion de la needziĝa disciplino. (La Croix, 4-8-93).

**Respondo de M-ro Plateau**  
Ĉefepiskopo de Bourges (Francio)  
kaj membro de la episkopa komisiono pri la klerikaro :

Ne ĝenas min ke edziĝintaj pastroj kunvenas sed oni devas scii ke estas ĉe ili diversaj sintenoj . Iuj, ne dezirante rompi kun la Eklezio , faris la klopodojn por havi la liberigon de la needziĝo kaj povi daŭrigi vivi ene de la Eklezio kiel laikoj (...)

Aliaj ne volis fari la kanonan demarŝon por reguligi sian situacion kaj volas altrudi ŝanĝon al la Eklezio nome de profeta vizio. Ili aktivadas kaj faras premgrupojn por atingi tion. Sed pri tio ĉi mi diras ke la Eklezio ne alprenas tiel grandajn decidojn sub trudado (...). Oni konas la opinion de la Eklezio pri la ordinado de edziĝinta viro\* . Des pli oni ne povas konfidi sacerdotadon al pastroj kiuj rompis sian promeson (...). Ŝajnas al mi ke la edziĝo de pastroj ne estas la mirakla solvo [ pri manko de pastroj ] (...). Ni jam havas diakonecon kun edziĝintaj viroj , kaj ne estas amaso da kandidatoj. Ĉe la protestantoj ankaŭ la pastroj, kiuj povas edziĝi , tamen ne estas tre multaj (...).

Cetere jam estas kelkaj malfacilaĵoj ĉe kelkaj paroj kies edzo estas diakono , ĉar iuj edzinoj estas misfartantaj en sia rolo de diakon-edzino. Mi kredas ke serioza pripensado estas farenda en la Eklezio pri la rolo de la virinoj.

( Intervjuo far Yves de Gentil-Baichis, el La Croix, 31-8-93.)



\* Fakte , se en la latina katolika Eklezio tio eblas nur se la edzino mortis, tamen ŝajnas ke la anglikanaj edziĝintaj pastroj kiuj eniras la latin-katolikan Eklezion fariĝas "kunedzinaj" katolikaj pastroj . Cetere en la grek-katolika Eklezio , kiu ankaŭ estas ja parto de la katolika Eklezio , plejparto el la pastroj estas (antaŭordinade) edziĝintaj kaj , do , edzoj kaj patroj de familio . Sed la katolika Eklezio estas plejofte (erare) identigita kun la sola latin-katolika Eklezio, ĝia nombo plej grava parto. (Noto de la redaktoro.)

Cetere M-ro Felikso Davidek, episkopo de Brno (Moravio) kiu mortis ĵus antaŭ la "velura" revolucio, asertis ke li ricevis de Vatikano la permeson ordini edziĝintajn virojn, cele al "savi" la endanĝerigitan ĉeĥoslovakian Eklezion . En 1992, el la 260 pastroj de la ĉeĥoslovaka "subtera" Eklezio, 60 estis edzoj , same kiel 4 el la 16 episkopoj. Estis eĉ mal-konfirmata famo pri ordinado de 3 ...pastrinoj .

(Laŭ artikolo de Nathalie Nougayrède , en Libération je 14-4-92 : "Ĉeĥoslovakio : Vatikano volas mastrumi en la subtera Eklezio".)



## 800-a datreveno de la naskiĝo de Sankta Klara

La jaro 1216 rezonas de la rido de Inocento la III-a . Ties kaŭzo estas , ke 23-jara junulino faris vere strangan peton . Klara petegas la papon ke li donu al ŝi la rajton ne havi fiksan enspezon nek posedaĵon... Ŝi nomas tion la *"privilegio de tre alta malriĉeco"* kaj, la petolulino, ŝi insistas ! Respektema sed obstina . De monatoj tio daŭras . Inocento la III-a ridas : *"Neniam oni petis papon pri tia afero."* Kaj li cedas .

Klara estas feliĉa . Por si kaj por tiuj virinoj iĝintaj ŝiaj fratinoj post forlaso de riĉeco kaj reputacio por vivi malriĉan, preĝan kaj iratan vivon ĉe la malgranda monaĥinejo Sankta Damiano en Asizo . Dum sia tuta vivo Klara persistos laŭ tiu vojo : *"Neniam mi deziras , ke oni tenu min kvita de la feliĉo sekvi la Kriston malriĉa"* . Kia aŭdaco en tiu tempo kiam la abatejoj revis nur pligrandigi siajn bienojn por vivi sen zorgo kaj firmigi sian memstarecon .

Sed al Klara neniam mankis aŭdaco . Dekok-jara, ĉu ŝi ne fuĝis el sia familia domo ? Tio okazis nokte, per malĉefa pordo, kaj sen iun peti pri io . Post kelkaj horoj ŝiaj haroj estis tonditaj : ŝi eniris la religian vivon Kristosekve kaj - plie ! - ŝi fieris pri tio .

Kiam ŝi estis nur 16-jara ŝi aŭdis pri iu Francisko . Tiu filo de tolkomercisto forlasis sian familion por malriĉe , malriĉege vivi kaj prediki la Evangelion . Klara estas senpacienca . Ŝi volas vidi lin per propraj okuloj, aŭdi lin per propraj oreloj . Senprobleme ! Ŝi sekrete ŝteliradas por renkonti Franciskon .

Tiuj renkontoj firmigas ŝian intuicion kaj akcelegas ŝian decidon : al Dio ŝi volas dediĉi sian vivon , laŭ la vojo montrita de la *"malriĉulo de Asizo"* .



La vesperon de ŝia forfuĝo el la familia domo en 1211, Francisko kaj liaj kunuloj atendas ŝin en la preĝejo *"la Portioncula"* por ĉeesti ŝian eniron en la religian vivon . La viroj el la tuta familio Di Favarone retrovas ŝin iom poste ; ili furiozas, sed estas tro malfrue . Ŝia patro minacas ĉiujn . Li donas al ŝi vangofrapon , tiras ŝin per la haroj kaj per la vestaĵoj, el kiuj ŝirpecoj restas en lia mano ĉar Klara alkroĉiĝis al la altaro . Kaj la altaro ne cedis . Finfine la gepatroj devis foriri , lasante sian filinon al la Sinjoro.\*

Ne facile por ŝi . Nia sankta Patrino la Eklezio estas embarasata antaŭ tian asketecon, ligita al tiom da feliĉo ! Klara malmulte manĝas , multe preĝas, surgenue, kun frunto ĉe la tero :

*"Kiam ŝi revenis de la preĝado, ni estis tre ĝojaj, kvazaŭ sinjorino Klara revenus el la ĉielo."*

Malgrau la frua morto de Francisko - ŝia ĉefa subteno - , malgrau la malsano kiu rapide trafis ŝin , Klara ne malfirmiĝos . Ĉiam preta servi, kuraĝigi siajn kunulinojn . Ĉiam same fervora kaj fida je sia Dio estas ŝi, kiu resanigas la malsanulojn desegnante sur ili la signon de la Kruco, ŝi kiu per sia preĝo fuĝigas la saracenojn kiuj minacis Asizon .



# Kalendaro

Kaj ĉiam same obstina ! Ŝi ne ĉesos klopodi por ke ŝia vivregulo estu agnoskita , unua religia regulo skribita de virino por virinoj. (...)

Dum la jaro 1253, Klara, subfosa de malsano de preskaŭ 30 jaroj, estas agonianta . Ŝi aspiras rekuniĝi kun sia Dio sed io ankoraŭ turmentas ŝin : la oficiala aprobo de ŝia vivregulo ankoraŭ ne estas subskribita . Do Klara ne decidiĝas morti.

Tiam Inocento la IV-a finfine donas al ŝi la papan agnoskon de ŝia regulo . Li cedis . Sen ridi. Jam temp' estas. Cent kvindek monaĥinejoj jam alligis sin al ŝi.

Klara mortas du tagojn poste : "Estu benata , Sinjoro kiu kreis min", elspiras ŝi. Kun rideto ■

Anne Ponce

"Klara, libera virino kaj amikino de Dio" , *La Croix* , 13-8-93 p.2.

\* La 4 lastaj frazoj estas aldono tradukita el Jean Anglade, *Grands mystiques* , Paris : Hermès, 1967.

Klara diris al unu el siaj Fratinoj : *Feliĉa tiu al kiu estas donata tiu intimeco de la dia bankedo . Feliĉa se ŝi amas per sia tuta koro tiun kies beleco naskas la admiron de la anĝeloj eterne . Tiun kies amo igas pli feliĉa."*

Klara verŝajne estis la plej fidela disĉiplo de sankta Francisko , 12-jarojn pli aĝa ol ŝi, kies evangelian utopion ŝi perfekte komprenis kaj vivis . Kaj kia spirita posteularo ! La humila semo enmetita en la Asizan teron , fariĝis post ok jarcentoj grandega arbo kiu daŭre multobligas siajn burĝonojn : 18.000 klaraninoj dissemataj en 960 monaĥinejoj ■

F-o Michel HUBAUT, franciskano

El "Bonan naskiĝtagon , Sinjorino sankta Klara !" , en *La Croix*, 11-8-1993, p.14 .

31.03 - 04.04: Interreligia Seminario Esperantista de ASISTI en Tabor, CS, pri *Neniu estonto sen interreligia paco : akcepti diferencoj, venki barojn...* . Inf.: B. Westerhoff, p.k. 500133, D-60391 Frankfurt (tel 069 519845).

22-24 apr.: Semajnfino de Kvakera Esperantista Societo en Ditchingham (Britio). Inf.: E. Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, Suffolk IP10 0JZ, Britio (Faks/Tel: 0473-717088).

30.5 - 03.06: Vizito de la Dalai-Lamao en Italio.

9-16 julio : 10-a Ekumena kongreso en Gostyn (Pollando).

18-22 julio : IARF-konferenco ĉe la Prot. Teol. Instituto en Cluj (Rumanio) pri *Religio kaj Homrajtoj en Eŭropo*. Inf.: IARF, 2 Market Street, Oxford OX1 3EF (tel 44(865)202744, fakso 202746)

23-30 julio : 79-a UK en Seulo, dum kiu ASISTI-a jarkunveno (pri i.a. ĉu aliĝi al WCRP), kaj IRKE.

24-29 jul.: Internaciaj kursoj de Martinus Centro en Nykøbing (DK). Interpretote en esperanto kaj en la angla, germana kaj nederlanda. Temo : *'Amo kaj vivarto'*. Inf.: Martinus Instituto, Mariendalsvej 94-96, DK-2000 Frederiksberg.

31.07 - 05.08: Martinus semajno 2 Temo : *'De Darvino ĝis Martinus'*.

1-8 septembro : 3-a interreligia kolokvo de WCRP. Temo : *'Kiel interreligia edukado en mediteranea Eŭropo povas plibonigi la integriĝon kaj redukti la migraojn'*. Informas : Ch. Lavarenne.

3-10 oktobro: 6-a Monda Konferenco pri Religio kaj Paco (WCRP) en Riva del Garda (I). Temo: *'Serĉado de religioj pri paco : akcepti diferencojn, superi dividojn'*.

8-9 oktobro : Franclingva Semajnfino organizita de "Evangile et Liberté" en Sète (F). Temo: *'Dialogo kaj religioj'*. Inf.: Pastoro Christian E. Mazel, "Les Genêts", Résidence Saint-Michel, F-84400 Apt, Francio (tel 90 74 56 37).

Komence de decembro : Vizito de la Dalai-Lamao en Marsejlo (F).

11-19 dec.: Vizito de la Dalai-Lamao en Barcelono (Hispanio).

27-29 jan. 1995 : KES Semajnfino ĉe Barlaston, GB-Stoke-on-Trent.



## Aboliciisto de la mortpuno: P-ro Albert GAU (1910-1993)

P-ro Albert Gau (...) mortis en lasta aŭgusto, 83-jara. Lia tuta vivo estis senĉesa lukto por nova humanismo. Li unue partoprenis en la du francaj konstituciantaj naciaj asembleoj (1945-1946) samtempe kiel P-ro Henri GROUËS (fame konata de la francoj, kiel "l'abbé Pierre") kaj la kanoniko Félix KIR, ambaŭ deputitoj (...)

Li estis vera antaŭulo en la longa lukto kiun li kondukis kiel kvazaŭ-solulo por la abolicio, en Francio, de la mortpuno jam ekde 1947. Ĝi sukcesis nur post 34 jaroj, la 9-an de oktobro 1981.

P-ro Gau prenis la iniciaton, tuj post la milito je 1939-1945, ekde la unua leĝigtempo, subskribi kaj deponi, la 6-6-1947, antaŭ la naskiĝanta nacia asembleo la unuan leĝproponon por la abolicio de la mortpuno.

Ties unua artikolo falas kiel tri-vorta \* gilotin-tranĉilego: "Mortpuno estas aboliciita". Lakonega (du frazoj), lia klarigo pri la motivoj donas kiel kuriozan aŭ ironian referencon la voĉdonon kiun ĵus adoptis la supera soveto de Sovetunio per sia abolicia ukazo je la 26-a de majo 1947 (poste sekvita de la malabolicia ukazo je la 12-1-1950).

La aŭdaca kaj izolita ago de Albert Gau kaj Prof. Paul Boulet (urbestro de Montpellier) estis sufiĉe kuraĝa en la Francio je 1947, kiam la esceptaj jurisdikcioj, la kortumoj kaj ĉefe la militaj tribunaloj eldiradis milojn da mortaj verdiktoj.

Li renovigis sian parlamentan iniciaton la 9-an de julio 1949, kun ankoraŭ pli mallonga klarigo pri la motivoj, "invokante" nur "la malobservegon de la deviga respekto al la homo" [7 monatojn post la Universala Deklaro pri la Homrajtoj].

Obstine, P-ro Gau denove prezentis sian leĝan proponon dum la dua leĝigtempo, substrekante ke la abolicio en Francio estus nature "servonta kiel modelo por la

civilizita naciaro". Lia teksto estis objekto de tre detala antaŭraporto de J. Isorni, advokato kaj deputito kiu emis pruvi ke la mortpuno estas en kontraŭdiro kun la ĝenerala evoluo de juro.

Venkita ĉe la elektado en 1956, Albert Gau redeponigis sian leĝproponon la 20-3-1958, pere de du virinoj (...) kun pli disvolvita klarigo pri la motivoj.

Tiuj izolitaj iniciatoj neniam estis, dum 34 jaroj, objekto de vera debato en publika kunsido sekvota de voĉdonado ĉar neniam registrita en la tagordo (...)

Oni ne povas diri ke vera abolicia premgrupo manifestiĝis en la franca Parlamento (...) ĝis la leĝprojekto, ĉi-foje registardevena, deponita la 2-an de aŭgusto 1981 kaj voĉdonita de 363, kontraŭ 117 neoj.

Intertempe Albert Gau estis engaĝiginta jam en 1973 kontraŭ la atomarmiloj, brula temo kerne de polemiko inter armeo kaj klerikaro.

Jam de pli ol 12 jaroj la gilotino kaj ĝia tranĉilego estas flankenmetitaj al la muzeo de la punhistorio, post preskaŭ 200-jara funkciado. Ciuj pasioj estingiĝis. Tiu semeto plantita de Albert Gau ĝermis. La leĝo nun senprobleme eniris la morojn. La du lastaj ekzekucioj per gilotino okazis en 1977.

**Georges VERPRAET**  
(El art. de *La Croix*, 26-8-1993.)

*Ni nur esperas, ke tiu ĉi ĝerminta semo baldaŭ fariĝos mond-vasta arbo, laŭeble antaŭ la jaro 2000. Ne hezitu peti la esperantlingvan peticion, jam aperinta en Asistilo n-ro 13 p.32, de "Internacia Ligo por abolicio..." , Via di Torre Argentina 76, I - 00186 Romo, Italio.*

*Kaj ankaŭ ĝermu lia dua semo, pri abolicio de la atomarmilaro... en malpli da tempo ol la unua!*

\* Fakte 5 vortoj, en la franca.



## 100-jariĝo de la Mariavitoj

La 2-an de aŭgusto 1893\*, en Plock (80 km nord-oriente de Varsovio) katolika monaĥino, Felicja Kozłowska, havis sian unuan mistikan travivaĵon. Tiam komenciĝis la sola pol-devena eklezio: la Mariavitoj (el la lat. Maria vitae).

Ŝia alvoko profundigi la religian vivon arigis ĉirkaŭ ŝi eĉ profesorojn de tiea altlernejo por pastroj. Ili penis vivi pli altmorale, ame; ofte senpage servis al simplaj kredantoj. Per praktika bonekzemplo ili rapide disvastigadis la ideojn de "patrinjo" (Kozłowska), precipe inter vilaĝanojn en centro de Pollando (tiam sub rusa administrado).

Kvankam ili firme deziris misii en kadro de la katolika Eklezio, tamen en 1906 ili estis ekskomunikataj kaj sekve kreis jam apartan eklezion. Nombrinte 45.000 anojn, post 15 jaroj ili triobliĝis, eĉ havis pastron en Parizo.

Post la morto de Kozłowska, la nova ĉefepiskopo, Jan Michał Kowalski, enkondukis novaĵojn, i.a. li ordonis pastriĵojn, poste episkopinojn. Tio (la samo kiel nun en luterana kaj anglikana eklezioj) kaŭzis furiozajn disputojn, haltigis abundan kreskon, fine dividis la eklezion. Progresema estrulo kun malplimulto estis forpelata al proksima Felicjanow (en 1935).

Ambaŭ mariavitaj eklezioj altvalorigis la virinan elementon en la Dia persono. En Felicjanow la "patrinjo" preskaŭ aldoniĝis, kvazaŭ kvara persono, al la Triunuo; en Plock oni kultis "patrinjon" kiel unu el inter la plej grandaj sanktuloj.

Precipe grava estis la laboro de ambaŭ eklezioj sur la socia nivelo. Ili vaste zorgis pri malriĉuloj kaj gejunuloj, fondis faklernejojn, kooperativajn kasojn por metiistoj kaj kamparanoj. Bedaŭrinde dum la komunista reĝimo ilia altvalora, bezonata agado estis malpermesita kaj malaperis.

De la frua komenco mariavitoj estis akre kaj brutale kontraŭbatalataj de la katolika Eklezio. Nur en 1965 estis unua objektiva artikolo pri ili en la katolika monatrevo "Wież". En 1971 sekvis la letero de la katolika episkoparo por pardonpeto. En 1983\*\* pastro de mariavitoj celebris sanktan meson en Castel Gondolfo [la papa restadejo apud Romo].

Nuntempe la mariavitoj nombras 26.000 anojn en Plock, 6.000 en Felicjanow\*\*\*.

Marek Krainki (Poznan)

## Al tutmondaj gefratoj

Ne plu parolu, ne parolu plu:

Kantu! Senfine kantadu

Ĝis perdigos la Racio

Ĝis malfermigis via Koro

Al la en ĝi radiantanta Esteco

Tute lumigata per Dia Lumo.

Al ĉiuj tutmondaj gefratoj

En ŝirita mondo

Kaj malhelaj tempoj,

Jen simpla mesaĝo por kreski

Anstataŭ cerbumi: Kantu

Eĉ viajn suferojn kaj angoron

Eĉ la dubojn kaj ploron.

Ĉiam vera miraklo okazas.

Vidu kiamaniere malaperas

La problemaj iluzioj,

Kiel nego sub suno

De interna Amo.

Libera Esteco en ni staras,

Kiun nia kanto liberigas.

(Anonima poemo delonge ricevita)

## Letero

Zeltweg, 21.6.93

(...) Mi intencas trovi kontaktojn kun homoj kiuj havas ankaŭ nur la jenan celon en siaj koroj: Amo, paco kaj frateco. Ne gravas, kiel, kaj per kiuj ideologiaj pensmanieroj, oni atingas ĉi tiujn plej valorajn karakterojn.

Per la elsendadoj de leteroj kaj pensoj paceme kaj ameme ankaŭ mi klopodas interligi kaj interrilatigi miajn diskverelitajn gefratojn tutmonde. Ĉiu spirita individuo estas parto de la dia kosmo, kiel atomo aŭ molekulo estas parto de viva korpo.

Ankaŭ la signoj paceme kaj tolereme interreligi en Asistilo indikas al mi la ekmarŝon de la homaro el mallumo kaj erarvojago spirite (...)

Anton

(Notoj de la apuda artikolo)

\* La aŭtoro certe erare skribis 1983.

\*\* Aŭ eble 1993 okaze de la 100-jariĝo.

\*\*\* Ni aldonu, ke en la tuta mondo ili estis ĉ. 400.000 komence de la 1970-aj jaroj (laŭ la enciklopedieto "Quid").



## La nekredebla pretendo

Recenzo pri *La nekredebla paradokso* de V. Brown (trad. Darlene Evans).

La aŭtoro, cetere scienculo pri zoologio kaj antropologio, unue pledas en la enkonduko "*Emocio kontraŭ Racio*", pri mensa malfermiĝo per alpreno rilate spiritajn demandojn, de "la esplometodo de la moderna scienco" (p.10).

Persone mi tute konsentas pri tiu deirpunkto! La aŭtoro poste petas alian specon de mensa malfermiteco (imagigante la leganton esti judo samtempa kiel Jesuo): "*Se vi vivus en tiuj tagoj, via sola ŝanco por rekoni Jesuon kiel li efektive estis, estus via posedo de malfermita menso, preta por vidi la gloron de profeto en lia mesaĝo, anstataŭ serĉi ĝin en lia aspekto*" (p.8).

Ankaŭ pri tio mi bonvole konsentas. Kaj mi eĉ povas tuj diri ke mi tre ŝatis la instruon de Baha'u'llah, kaj ĉefe de lia filo Abdu'l-Baha, kies mesaĝon mi pli bone konas (pro legado ekzemple de liaj belegaj "*Parizaj paroladoj*", en traduko de Lidja Zamenhof).

En la 2-a ĉapitreto, "*Timo, la Patro de Blindeco*", la aŭtoro ankaŭ prave konstatas cetere: "*Mirige la plejparto de la religiaj homoj de la mondo apartenas al iu difinita religio sole pro hazardo de naskiĝo, ĉar ĉiu naskiĝis en familio, kiu estis parto de difinita religio*" (p.12)

Sed jam kiam li parolas pri "*tri klaraj kaj definitivaj manieroj ekzameni veran profeton de Dio donitaj en Biblio*" (p.16) mi malkonsentetas. La unua citaĵo ekzemple (Mt 7,16-18) ne parolas ĝenerale "*pri profetoj venontaj*" sed pri la falsaj, kiel montras la antaŭa versiklo: "*Gardu vin kontraŭ la falsaj profetoj*". Tia kriterio ne estas do por "*rekoni novan profeton de Dio*" (p.16) ĉar neniu estas anoncita de la Nova Testamento, nur la Sankta Spirito.

La 3-a ĉapitreto estas titolita: "*La Homoj Kiuĵ Forĝesis Fari Demandojn*", kaj precize pri tiu ĉi mi havas kelkajn demandojn aŭ rimarkojn: mi esperas, do, ke la

aŭtoro kaj la bahaanoj pardonos min prezenti kelkajn el ili!

Mi rimarkis kelkajn malprecizaĵojn, verŝajne ne intencajn. Mi provos ĝustigi nur unu, kiel ekzemplo, aŭ almenaŭ "fari demandojn". Mi citas (el p.24):

"(...) En la jaro 1844 miriadoj da adventistoj tra la tuta mondo atendis la tujan venon de sia promesito. En Usono la granda kristana movado de la sekvantoj de William Miller vokis homojn lasi la mondaĵojn kaj (...) preĝi kaj atendi la alvenon de Sinjoro Jesuo (...) Kiam la jaro 1844 pasis kaj nenia granda videbla evento de gloro okazis en la ĉielo, kiam nenia laŭlitera Jesuo venis (...) kion faris la plejparto de tiuj milionoj da adventuloj? Ili diris, ke ili faris eraron (...)"

Unue, anstataŭ milionoj oni legas el eksteraj, sciencaj fontoj: "*La plejparto el la 50.000 ĝis 100.000 homoj kiuĵ atendis la alvenon, rekonis sian frenezaĵon kaj rezignis sian esperon*".

Due pri la dato: "*Miller kalkulis, ke la alveno de la Kristo okazos inter la 21-a de marto 1843 kaj la 21-a de marto 1844*"; ĉar nenio okazis, "iomete pli malfrua dato, en oktobro 1844, [estis] fiksata surbaze de la juda kalendaro (...)" . Ekzakte "*la 22-a de oktobro, tago de la juda festo de la pentoferoj*".

Nu la bahaaj eventoj okazis la 22-an de majo 1844 vespere, do ne tute precize je la antaŭdirita dato: ĉu Dio ne povus esti ekzakta? Kaj fakte ne temas pri la alveno de la promesito, kiu laŭ la "Bahaa Internacia Komunumo" estas Baha'u'llah, sed pri la deklaro de Mirza 'Ali Muhammad, ke "*Dio la Superega elektis Lin al la rango de Babeco*" (t.e. "Pordegeco"). Kvankam al la demando de ĉefa religia altrangulo "*Kiu vi pretendas esti?*", li respondis "*Mi estas, mi estas, mi estas la promesito! (...)*" (p.34), la bahaanoj rigardas lin ne kiel la profeton, sed nur



kiel la "antaŭinton" (Esslemont) de Baha'ullah: "Li pretendis malkaŝe, ke li mem estas nur la antaŭanto de iu multe pli granda, kiu, post la morto de Bab, alportos mesaĝon, kiu unuigos la mondon." (p.30).

Ŝajnas do al mi, ke ne estas tute perfekta koincido, sed nur erara proprigo de cetero ne tre konvinka profetaĵo (kiel ni tuj vidos). Krom la data malkongruenco oni devus kredi ke la "reveno de la spirito de Dio al tero en homa formo" (p.22) okazis dum la deklaro de Bab (la "antaŭulo" de Baha'ullah) - dum lia homa formo estis jam 25-jara! - aŭ kredi ke nek Bab nek Baha-ullah, sed ĉi ties filo Abdu'l-Baha, estas la promesito (ĉar li naskiĝis la saman nokton), kio estas malakceptita de la bahaanoj, kaj ne celita de la aŭtoro: "La promesito ja aperis en la jaro 1844 en Persujo, en la urbo Sirazo" (p.28) dum Abdu'l-Baha naskiĝis en Teherano.

Mi esperas, ke mi ne konfuzis niajn bahaajn amikojn per faktoj (vidu citaĵon p.10). Kial ĉiukaze tiaj antaŭdiraĵoj ne estas konvinkaj? Ĉar la aŭtoro uzas ankau por pruvi ke "la antaŭdiro de Daniel estas grava por determini la precizan jaron de la "reveno de la krista spirito" (p.24), citaĵon el Mateo (24,14-16). Li nur "forĝegas" citi kelkajn aliajn frazojn el la sama parolado de Jesuo: "Se iu diros al vi: Jen ĉi tie la Kristo, aŭ: Tie, ne kredu, ĉar levigōs falsaj kristoj kaj falsaj profetoj" (Mt 24, 23-24), kaj ĉefe: "Sed pri tiu tago kaj la horo scias neniu, eĉ ne la anĝeloj de la ĉielo, nek la Filo, sed la Patro sola" (24, 36), kaj: "en horo, kiam vi ne atendas, la Filo de homo venas" (44). La aŭtoro citis p.18 alian samsencan versiklon: "(...) vi ne scias en kiu horo [aŭ: tago] via Sinjoro venos (...)" (24,42); sed li ne vidis la kontraŭdiron kun la serĉado pri "antaŭdiro en Biblio" (p.22).

Ĉu oni rajtas pravigi sin mem elektante frazerojn kaj forlasante aliajn sen "konsideri ĉiujn flankojn de problemo" (p.10)?

Tio ne ŝajnas al mi scienca metodo. La "esplora metodo de la moderna scienco" (p.10) estas malsama (jen alia temo - eksegezo - ne pritraktebla en recenzo).

Krom tio, estas interesaj biografietoj de "Bab" (Mirza Ali Muhammad, 1819-1850, en la 4-a ĉapitro "Plenumiĝo komenciĝas"); kaj de Baha'ullah (c. 5: "La Suno de Plenumo"; nova proveto proprigi al si bibliajn erojn sub la titolo "Kelkaj profetaĵoj pri Baha'ullah" (c. 6), ankoraŭ malpli konvinka por mi (eble ĉar mi ne havas la taŭgan tradukon, ekzemple de Micha 7,12?))

Poste, la "Kelkaj Profetaĵoj de Baha'ullah" (c. 7) ne estas science pritrakteblaj ĉar la aŭtoro ne donas la precizajn citaĵojn krom unu: "Ni aŭdas la lamentadon de Berlino, kvankam hodiaŭ ĝi estas en plej elstara gloro (...) kaj havos alian vicon" (p.54).

Kiel aldoni, estas listo de la ok "Bahaaj Principoj" (c. 8), el kiuj ni citu: "2. Sendependa esploro de la vero (...) ni estas instigitaj ekzameni ĉiujn religiojn kaj ideojn sen antaŭjuĝoj", kaj: "5. Religio devas harmonii kun scienco kaj racio (...) Ĉiuj niaj ideoj devas esti submetitaj al scienca esplorado kaj al la apliko de racio kaj inteligento". Jen kion mi provis fari en tiu ĉi recenzo.

Kaj fine post "Averto de Jesuo" (Lk 12,54-56), profetaĵo de Abdu'l-Baha en traduko de Lidja Zamenhof, ankoraŭ nur duonrealigita: "Dankon al Dio, ke d-ro Zamenhof elpensis la lingvon Esperanto. Ĝi posedas ĉiujn eblajn kvalitojn por fariĝi rimedo de internacia interkomunikiĝo (...) Per senlaca penado kaj sinoferemo flanke de ĝiaj pioniroj Esperanto fariĝos universala. Tial ĉiu el ni devas studi tiun ĉi lingvon kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo, por ke ĝi estu tagon post tago pli vaste konata, por ke ĝi estu akceptita de ĉiuj nacioj kaj registaroj de la mondo, kaj fariĝu parto de la programo en ĉiuj publikaj lernejoj (...)"

Christian Lavarenne

N.B. Pro manko da spaco ni devis rezigni aperigi niajn 19 notojn kun referencoj.



## NUNTEMPAJ SPIRITAJ MESAĜOJ

En lastaj jardekoj ili , laŭŝajne,

- multobliĝis
- graviĝis
- alvokis al paco , amo, unuiĝo , persona engaĝiĝo kaj modesteco antaŭ la Mistero.

Ĉu bremsindas ilia diskonigo ?

Resonas la Jesua alvoko :

**KION VI AŬDAS EN LA ORELOJN ,  
TION PROKLAMU SUR LA TEGMENTOJ**

(Mateo, 10,27)

### Panoramo de spiritaĵoj movadoj nuntempaj

De la 31-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1994 , ĉe la **Kultura Centro Esperantista (La Chaux-de-Fonds)** , kun François Degoul, instruisto pri la franca, latina kaj greka lingvoj kaj beletroj, estrarano de ASISTI.

Analizo kaj difino de bazaj konceptoj : religio , sinkretismo, spirito, esto, vero, paco, profeto, fido, neŭtraleco...

Tri kampoj de spirita renoviĝo :

- Multiĝo kaj graviĝo de "privataj revelacioj" en Eŭropo : Fatima (1917) , Arès (1974) ...
- El islama kampo : bahaisma kaj sufisma renoviĝoj.
- En Oriento , sinkretismaj movadoj : Oomoto...

Ĝeneralaj tendencoj :

- Unuiĝo kaj paco.
- Alvoko al spirita vivo kaj persona engaĝiĝo.

Etika problemo, akordigi personan identecon kun universalismo: la ekzemploj de L.L. Zamenhof kaj Edmond Privat.

Kaj dua parto de ciklo pri literaturo, lingvo kaj historio de esperanto : " 1906-1922 : **Homaranismo de Zamenhof, mondanismo de Hector Hodler (U.E.A.) kaj sennaciismo de Lanti (S.A.T.)** " la 25-an kaj 26-an de junio 1994 ĉe K.C.E. kun Claude Gacond ("kiu adaptiĝos al la lingva nivelo de la kursanoj").

( Ĉetere la tuta senpaga programo 1994 estas mendebla ĉe KCE, CP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.)



## Kion mi aŭdis en la orelo aŭ en la koro ?

- kvinjar-aĝa , ke amo perfekta min amas kaj aŭskultas ;
- iom poste , ke Jesuo kaj la kristanoj klarigis tion ;
- iom poste , ke Maria , patrino de Jesuo , aperis plurfoje al infanoj en okcidenta Eŭropo , interalie en 1858 en Lourdes, en suda Francio , kie resaniĝis multe da malsanuloj , kaj en Portugalio en 1917 en Fatima , kie pluraj dekmiloj da personoj vidis sun-dancadon , kaj infanoj ricevis tri mesaĝojn : la dua anoncis konvertiĝon de Rusio , kaj paco-tempon por la mondo, kaj la tria restas sekreta en la Vatikanaj arkivoj.
- en la aĝo de dudek , ke disiĝoj inter kristanoj estas ne-pravigeblaj ;
- ĉirkaŭ la aĝo de kvardek , ke Maria aperas al infanoj en Medjugorje en Jugoslavio por alvoki al paco ;
- je la sama epoko, dank'al esperanto , ke ankaŭ Deguĉi Nao en Japanio vere ricevis Dian alvokon en 1892.
- Komence de 1989, iu esperantisto montris al mi libron titolitan "La Revelacio en Arès-urbo" . Mi demandis : "Ĉu temas pri sekto aŭ komerca afero ?" Li respondis : "Ne, vi devus legi ĝin" . Mi legis , kaj kredis ke vere aperis al Michel Potay por dikti al li laŭvortan mesagon Jesuo en 1974 kaj Dia voĉo en luma bastono en 1977 : "Mi estas Tiu, Kiu parolis per Adamo (...) per Abraham (...) , per Moseo (...) , per Muhamado (...) per Elija (...) , per Jesuo (...) , kaj Mi parolas per li al vi hodiaŭ (...) . La Vero estas, ke la mondo ŝanĝiĝu." ( Mi do komprenis ke ankaŭ Korano estas esence Dia parolo.)
- En februaro 1992 , trafis en miajn manojn "La Profetaĵoj de la Fraudais", kiujn mi relegis tri fojojn.
- En la Viena kongreso de UEA, en 1992 , mi intuis ke, fine de la 19-a jarcento, ankaŭ Bahauallah estis vera profeto.
- En printempo 1993 , mi legis en *Monato* , ke la Amo de Dio manifestiĝis per amaso da neatenditaj resaniĝoj post la instruadoj de Bruno Gröning en Germanio , kaj mi poste ĉeestis la ĉi-fakan kunvenon en la UK de Valencio.
- La 17-an de julio 1993 , dum ekumena-kongreso en Viviers (Francio), Christian Lavarenne proponis al mi reprezenti ASISTI en Japanio.
- La 1-an de aŭgusto 1993, je la 10-a kaj dek , de Valencio mi revenis hejmen kaj decidis tuj iri al la sankta meso de mia paroĥo . Unu horon poste , amiko tie renkontita donacis al mi du-voluman verkon : " La vera vivo en Dio : interparoladoj kun Vassula " . Ek de 1985, de tiu svisa ortodoksa virino Jesuo Dio Patro - Kristanoj iam komprenos - gvidas la manon kaj skribas per sia propra skribmaniero korŝiran alvokon al Amo , Paco kaj Unuiĝo . La legadon , komencitan unu horon post mia alveno el Valencio , mi finis unu horon antaŭ mia foriro al Japanio.
- La 9-an de aŭgusto 1993 , en la Oomoto-templo de Ajabe en Japanio , iu Koreo donis al mi libron en esperanto : " La baza skribo de Wonbulgyo " , doktrino kies fondan leteron signis en 1919 iu mirakla sanga makulo, kaj kiu, surbaze de iu budhisma-konfuceanisma sinkretismo , kontribuas al paco, kaj al la spirita unuiĝo de Oriento.
- La 10-an de aŭgusto 1993, dum kvarhora piedirado meditanda en la flughavena koridoro de Hong-Kong , mi plurfoje sentis la misteran gravecon, buntecon kaj unuecon de la nuntempa Dia parolado al homoj.

François Degoul , Montreuil (F), 11-8-1993  
(daŭrigota)



En Asistilo, numeroj 10 kaj 11 (printempo kaj aŭtuno 1991), ni aperigis du-lingvajn erojn da okcitana religia poezio: jen la ŝlosilo por senpere legi la originalojn! Temas pri scienca verko de instruisto ĉe la Fakultato pri Beletro de la Katolika Instituto en Tuluzo, ankaŭ sekretario de la "Lingvistika Fakto" de la Instituto de Okcitanaj Studoj.

En la enkonduko la aŭtoro klarigas, ke per la kono de la mil plej oftaj vortoj el lingvo oni povas kompreni pli ol 80% el normalaj tekstoj, kiel li mem povis kontroli. Ankaŭ ni provis, sed pri nur unu teksto, kaj plie kiu estas poezia kaj religia, do multe pli riĉa ol normala ("L'albre d'amor", vidu n-ran 11 p.21). Ni konstatis, ke oni tamen povas trovi 60% el la vortoj en tiu vortaro kaj ne tre malfacile kompreni multe pli:

- aŭ pro ilia simileco en la okcitana kaj en esperanto (kiam oni scias ke c = k...); ekzemple font/fonto, sant/sankta, creata/kreita, ver,verai/vera, natura/naturo, comun/komuna, desir/deziro, fundament/fundamento, molts/multaj, putana/putino, carismo/karismo; eble ankaŭ enfant/infano, ben/bono kaj douç/dolça (aŭ ĉu pro tio ke mi estas franc-lingvano?);

- aŭ pro la ekzisto de la radikala vorto en la vortaro; ekzemple amor,amador/amo,amanto, cor, coral/koro,kora, temp,temporal/tempo,tempa, sentir,sentent/senti,sensiva(sentanta), jove,jovent/juna,juneco, fin,finiment/fino, fino (nuanco?);

- aŭ, male, pro la ekzisto de derivaĵo en la vortaro; ekzemple vertat,ver/vereco,vera, natural, natura/natura,naturo, masculin, mascle/vira,viro, femenin,feme/ina,virino;

- kelkaj aliaj simple estas en alia formo: aultra/autra (alia), pascor/pascas (pasko), senes/sense (sen).

Restas tamen ankoraŭ kelkaj vortoj, krome de la pli teknikaj kiel procesis/devenas, creature/kreitaĵo, prosme/proksimulo, temprada/bremsata. Ni do esperas ke baldaŭ aperos kiel logika sekvo iu "Diccionari de dos - aŭ ec tres - mila mots...", kvankam la dua milo komprenigas nur malpli ol 10 pliajn%, kaj la tria, 4% el la vortoj de normala teksto!

**Jacne TAUPIAC**, *Diccionari de mila mots: Los mila mots occitans mai importants ambe la traduccion en catalan e esperanto* [Milvorta vortaro: la mil okcitanaj vortoj la plej gravaj kun traduko en la katalana kaj esperanto], Tolosa: Collègi d'Occitania, 1992, 495 p., antaŭparolo de Peire Bèc, emerita profesoro de la Universitato en Peitieu [Poitiers]; kun 2-paĝa bibliografio. Bindita; ilustrita. La prezento estas agraba kaj klara, dank'al uzo de 5 malsamaj letertipoj. 99 FF (+ 22 FF por la ŝenkostoj), ĉe la aŭtoro: "La Piboleta", Sant Marçal, F-82000 Montalban, Occitania, Comunitat europea. Christian Lavarenne

### Interreligia seminario

De la 31-a de marto ĝis la 4-a de aprilo 1994, en Tabor (Ĉeĥio). Temo: *Neniu estonto sen interreligia paco: akcepti diferencoj, venki barojn, serĉi komunon*. Programo: 31-3 interkona vespero 1-4 matene: prelego + diskuttemo "Ĉu teologie pravigeblas supereco de unu religio super alia?" posttagmeze: vizito de la urbo vespere: "La Zamenhofa konceptaro pri interreligiismo". 2-4 matene: prelego + diskuttemo "Religio fundamentita vizio pri la homara estonto". posttagmeze: laborgrupoj. vespere: "Kiel interreligio mediti, devoti, preĝi?" 3-4 matene: konkludoj (kaj meso) posttagmeze: busekskurso. vespere: arta-medita vespero. Pr.:200DM, PL,H,CS:75, aliaj malriĉaj:50 Kontakto: vd adreson ĉe Kalendaro, p.25.